

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 41, Junio–Julio 2021



*Jonas Alströmer*

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)

# Enhavo

Enhavo.....	2	La manĝaj eventoj de la jarmilo en Svedio – Årtusendets mathändelser i Sverige.....	23
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	”Kroppkakor” – ”Korpkukoj” – sveda tagmanĝaĵo .....	25
Espeporko meditas.....	3	La bongusta tubero de Alingsås – Den goda knölen från Alingsås.....	26
Gotenburgo celebris sian 400an naskiĝtagon en 4 junio 2021 .....	4	Esperanto kaj naciismo .....	27
Gotenburgo 400-jara – Göteborg 400 år .....	5	Fabelo pri io .....	28
Antaŭaj ”Gotenburgoj” .....	6	Pri 99 .....	29
Bildoj el ”Göteborg 400 år”, celebrita la 4an de junio.....	7	Algebra seriokolizio.....	29
Intervjuo kun Sten Johansson pri lia verkado.....	9	Studanta kato.....	30
”Falsaj amikoj” .....	9	Omni raportas pri mistikaj flugantaj objektoj.....	31
Raporto el Gdansk de Elvira fine de majo....	10	Kontribuo de Harold Brown al Esperanto- teatro .....	32
Vesperaj sonoj de birdoj ĉe rivero Göta Älv – Fågelljud på kvällen vid Göta älv.....	10	Bildoj, faritaj de Harold Brown .....	38
Nyiragongo denove vomas lafon .....	11	UK en Belfasto nuligita: anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso .....	40
Pli pri la vulkana erupcio .....	14	Esperanto sur la Strando.....	41
Tor – la Skandinava dio .....	15	Per kio oni estingas la somersoifon en la diversaj eŭropaj landoj.....	41
Afrika savano en Skanio – En Afrikansk savann i Skåne.....	16	Frusomera promeno en Gotenburgo .....	42
Namibio kaj ni .....	17	Albumeto de la kvarcentjara naskiĝtago de Gotenburgo.....	45
Ekvidetoj el mia fotosemajno en majo – Glimtar från min fotovecka i maj .....	20		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,  
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53  
32, ingeagerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo:  
Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



# Espeporko meditas



♻ Espereble mia lasta komento pri Covid 19 (el Facebook) ⇨

Sittbänk "Virus" från IKEA.



- ♻ La dramo de Esplor daŭras. Se li ne havus laboron li volonte studus. En Svedio ne-eŭropeanoj nun devas pagi por la kursoj. Kiel estas en Francio? Li ja parolas la francan.
- ♻ Por nia junia-julia numero li verkis interesan artikolon pri la **vulkana erupcio** en Kongo Kinŝasa.
- ♻ En alia ekskolonio, **Namibio**, Carl-Olof Selenius i.a. rakontas pri svedoj. Li skribas: "Ĉe unu okazo en la 19a jarcento, 70 el 120 eŭropanoj en Namibia estis de Vänersborg".
- ♻ Kiel vi ĉiuj scias fulmotondro estas rezulto de la batoj de la nordia dio Tor per sia martelo. Aŭ ĉu estas alia klarigo? Do, legu la artikolojn **de Ingegerd** pri **fulmotondro!**
- ♻ Dum la pandemio la intereso pri birdoj kreskis, laŭ la televido. Nun, ĝuu, vi ĉiuj birdobservantoj: **tri artikoloj pri birdoj** troviĝas en ĉi tiu numero!!!
- ♻ Birdoj estas interesaj, sed mi malfacile povas esti certa pri la specio. Ili forflugas tro rapide. Male pri arto. Sur la muroj de **Kerstin Rohdin** troviĝas bildoj, **faritaj de Harold Brown**. Vi vidas kelkajn el ili en ĉi tiu numero. Iam ni havis akvarelojn de Harold Brown en Ora Ĵurnalo, sed nun

temas pri iomete alia stilo, pli drameca. Se ili plaĉas al vi, telefonu al Kerstin (08-777 08 61).


- ♻ **Gotenburgo ricevis siajn urbajn privilegiojn la 4an de junio, 1621.** La redaktoro de Göteborgs-Posten, **Christan Wedel**, verkis novan libron pri la urbo. Ĝi estas dika, sed li ja esploris la urbon dum multaj jaroj. Legu pri la urbo kaj spektu la fotojn!
- ♻ **Gotenburgo do festis sian naskiĝtagon – ĉefe per interreto**, sed la Esperanto-Societo de Gotenburgo gratulis la urbon per reala **liniodanco sur la Esperanto-flago** ĉe la Esperantoplaco. Ni volis montri ke ni estas movanta, vigla societo(!) La prezidanto de Tidsskriftsverkstan, **Christer Wigerfelt**, faris la videon. Trafikbruo ĝenis la parolon de **Lasse Granat**, sed vi tamen povas aŭdi lin bone. La melodion de la liniodanco, Jeruzalema, Christer prenis el Youtube – sen trafikbruo. La video troviĝas en [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org). Spektu ĝin!
- ♻ En julio la redakcio libertempos. Havu agrablan someron!

Ĝis aŭgusto!

/Siv

# Gotenburgo celebris sian 400an naskiĝtagon en 4 junio 2021

Pro la pandemio la GRANDA popola celebros okazos nur en 2023.



# Gotenburgo 400-jara / Göteborg 400 år



Se oni volas koncentritan imagon de la gotenburga historio, oni legu K.P. (K.P. = Kamrat-Posten, signifas la Kameradan Poŝton). Ĝi stas svedlingva revuo por 10 – 16-jaruloj.

Mi plukas el tiu interesa revuo:

”Ĉi tie situu la urbo!” diris la 24-jara reĝo, montrante la lokon kaj fondis Gotenburgon en 1621. Nizo (aŭ kolombo) cirkulis super la areo kaj montris al li la ĝustan lokon. Ĉiuokaze tion la infanoj iam lernis.

Tiel simple kompreneble ne estis.

Okazis pluraj militoj kun la najbara lando Danio. Pluraj novkonstruitaj urboj estis forbruligitaj de la danoj.

La reĝo devigis homojn translokiĝi al la nova urbo. Sed ne estis populare loĝi ene en kastelo, ĉirkaŭita de 40-metra larĝa ringfosaĵo kaj de 8-metraj altaj muregoj. La fortifikaĵo estis konstruita kiel stelo kun la pintoj rigardantaj kontraŭ la malamikoj. Krome oni nokte estis enŝlosita. Multaj pli volonte restus en Nya Lödöse, pli malnova urbo situanta proksime.

Sed kial la reĝo volis urbon ĉe la elfluo de Göta Älv (riverego)?

Pro la loko. La provincoj Halando, Bohuslando kaj Skanio daŭre apartenis al Danio. Gotenburgo estis la plej bona loko por

Om man vill få en koncentrerad bild av Göteborgs historia, ska man läsa K.P. = Kamrat-Posten. Det är en tidskrift för 10 – 16-åringar.

Jag plockar från den här intressanta tidskriften:

”Här ska staden ligga!” sa den 24-årige kungen, pekade ut platsen och grundade Göteborg 1621. En sparvhök (eller duva) kretsade över området och visade honom rätt plats. I alla fall var det så barnen fick lära sig förr.

Så enkelt var det förstås inte.

Det hade varit flera krig med grannlandet Danmark. Flera nybyggda städer hade bränts ner av danskarna.

Kungen tvingade människor att flytta till den nya staden. Det var inte populärt att bo inne i en borg, omgiven av en 40 meter bred vallgrav och 8 meter höga murar. Fästningen var konstruerad som en stjärna med spetsarna riktade mot fienden. Dessutom var man inlåsta på nätterna. Många ville hellre stanna kvar i Nya Lödöse, en äldre stad som låg i närheten.

Men varför ville kungen ha en stad vid Göta Älvs mynning?

På grund av läget. Landskapen Halland, Bohuslän och Skåne tillhörde fortfarande

ekspedi varojn ŝipe kaj sendi militŝipojn okcidenten.

Estis problemoj konstrui tie. Malseke kaj argilhave! Tial la reĝo alvokis nederlandanojn, kiuj estis spertuloj konstrui sur marĉoj.

Estis la nederlandanoj, kiuj decidis kiel Gotenburgo aspektu, kun kanaloj kaj stratoj en kvadrata reto, kiel en la urbego Amsterdamo. La peza laboro fosi en la argilo estis farita de kampulaj servistoj kaj soldatoj.

En la estraro, kiu decidis pri la urbo, estis dek nederlandanoj, sep svedoj kaj unu skoto. La nederlanda eĉ estis la oficiala lingvo en Gotenburgo ĝis 1670.

Hodiaŭ troviĝas preskaŭ neniam domoj restantaj de 1621. Dependas de la fakto ke tiel ofte brulis, same kiel en multaj aliaj urboj je tiu tempo. Lignaj domoj kun pajlotegmentoj kaj liberaj fajroj igis ke facile iĝis fajroj. Jam en 1669 duono de la urbo forbruliĝis.

Kiel do funkciis Gotenburgo? Ja, ege bone! Dum 400 jaroj neniuj malamikoj sukcesis eniri Gotenburgon.

La muregoj estis malkonstruitaj en la 19a jarcento. Restas Skansen Kronan, Skansen Lejonet (skans = reduito) kaj la bastiono Carolus XI Rex. Ankaŭ grandaj partoj de la ringfosaĵo restas. Estas tie, kie la Paddanboatoj iras, plenplenaj de turistoj.

La 4an de junio en 2021 estis la vera 400-jara naskiĝtago de Gotenburgo, sed pro la pandemio oni prokrastas la grandan celebron ĝis 2023. La samo okazis je la 300-jara jubileo en 1921. La "hispana malsano" furiozis kaj oni celebris la 300-an jubileon nur en 1923.

Kiun malsanon malhelpos la 500-jaran jubileon en 2121, laŭ vi? /Siv

Danmark. Göteborg var den bästa platsen att skeppa varor och skicka krigsfartyg västerut.

Det var problem att bygga där. Blött och lerigt! Därför inkallade kungen holländare, som var experter på att bygga på våtmarker.

Det var holländarna, som bestämde hur Göteborg kom att se ut med kanaler och gator i rutnät, som i storstaden Amsterdam. Det tunga arbetet att gräva i leran utfördes av drängar och soldater.

I styrelsen, som bestämde över staden satt tio holländare, sju svenskar och en skotte. Holländska var t.o.m. officiellt språk i Göteborg fram till 1670.

Idag finns nästan inte några hus kvar från 1621. Det beror på att det brann så ofta, liksom i många andra städer på den tiden. Trähus med halmtak och öppna eldar inomhus gjorde att det lätt blev bränder. Redan 1669 brann halva staden ner.

Hur fungerade Göteborg då? Jo, väldigt bra! På 400 år har inga fiender lyckats ta sig in i Göteborg.

Murarna revs på 1800-talet. Kvar är Skansen Kronan och Skansen Lejonet och bastionen Carolus XI Rex. Även stora delar av vallgraven är kvar. Det är där Paddanbåtarna går, fullastade med turister.

Den 4 juni 2021 är Göteborgs riktiga 400-års födelsedag, men p.g.a. pandemin skjuter man upp det stora firandet till 2023.

Detsamma hände vid 300-årsjubileet 1921. Spanska sjukan härjade och man firade 300-årsjubiléet först 1923.

Vilken sjukdom kommer att hindra 500-årsjubiléet år 2121, tror du? /Siv

## Antaŭaj "Gotenburgoj"

Sed ekzistis kelkaj antaŭaj urboj en ĉi tiu areo. Jam en la dekunua jarcento estis Lödöse, 40 km norden ĉe rivero Göta Älv. Götaholm/Nya Lödöse estis fondita 1473 ĉe la elfluo de la rivereto Sävån en Göta Älv en la nuntempa urboparto Gamlestaden. »


Dum la jaroj 1547–1563 la urbo situis – sub la nomo Älvsborg – ĉe la kastelo Älvsborg en la nuna urboparto Majorna. Sed tiu urbo estis forbruligita dum la Nordia Sepjara milito kaj Nya Lödöse rericevis siajn urbajn privilegiojn ĝis Gotenburgo fondiĝis en 1621. (El nia retejo)

# Bildoj el "Göteborg 400 år", celebrita la 4an de junio

En 1621 Gotenburgo ricevis urbajn privilegiojn en tiu tago.



1) Therese Brusberg, la projektĉefo de "Gbg 400 år", gvidis nin dum du horoj tra la historio kaj geografio de Gotenburgo. Plej gravas la gotenburganoj. Ili ja konstruis la urbon kaj nun evoluigas ĝin.



2) Kristian Wedel, verkisto kaj redaktoro de Göteborgs-Posten, montras mapon pri la kvartaloj de Gotenburgo de la 17a jarcento. En la fono statuo de la fondinto de la urbo, Gustav II Adolfo.



3) La nova ponto super Göta Älv, Hisingsbron, ĵus pretiĝis. Kelkaj diras, ke la kvar pontkolonoj similas al tiuj de Ullevi, la futbala centro.



4) Kio estas la plej tipa por Gotenburgo? Kristian listas la jenon: la pluvo, la gotenburga humuro kaj la tramoj. Por ĉi tiu tago oni havas novan tramlinion – numero 21.



5) Ŝajnas ke ankaŭ Gustav II Adolfo eniris la tramon.



6) En la 18a jarcento la ŝipo Götheborg iris al Ĉinio por la Hindia Kompanio. Jen nuna repliko.



7) Iam Gotenburgo estis granda havena urbo. Multaj laboris ĉe la dokejoj kaj ŝipfarejoj.



8) Edzino de maristo rigardas okcidenten atendente la ŝipon kun ŝia edzo.



9) La guberniestro de Vestrogotio, Anders Danielsson, gratulas Gotenburgon de sia laborejo en la rezidejo, kiu troviĝas en Gotenburgo.



10) De Stokholmo la kronprincino gratulas Gotenburgon. I.a. ŝi diris, ke ŝi havas agrablajn memorojn de Gotenburgo.



11) La aktoro Tomas von Brömssen tenas enbotelan mesaĝon al Gotenburgo por ĝia 500-jara naskiĝtago en 2121. Li ne metos la botelon en la riveron, sed en la urbomuzeo.

Sube ligilo al recepto de la torteto dekstre. ⇒

[www.goteborg2021.com/fira-dar-du-ar/fira-dar-du-ar-med-jubileumsbakelsen/](http://www.goteborg2021.com/fira-dar-du-ar/fira-dar-du-ar-med-jubileumsbakelsen/)



12) Estas tradicio en Gotenburgo krei tortetojn por grandaj celebrindaj tagoj. Jen la naskiĝtorteto de Gotenburgo. Bonvolu gustumi!





# Intervjuo kun Sten Johansson pri lia verkado

El *La Monato de Verkistoj* en YouTube:

<https://www.youtube.com/watch?v=WNz1mgnT-7U>

La gotenburga librorondo ja okupiĝas pri la libro "Sepdek ok" de Sten Johansson. Ĝi aperis en oktobro 2020. Chelsea Rae Moses ne demandas pri tiu libro, sed pri alia, pri "Marina", kiu ankaŭ estas skribita origine en Esperanto.

Sten Johansson ankaŭ verkas svede, sed svedparolantoj estas ja koncentritaj en parto de la mondo, sed libroj verkitaj en Esperanto atingas landojn diversloke en la mondo.

Do, aŭskultu la viglan intervjuon! /Siv



## "Falsaj amikoj"

Dum la pasinta Gotenburga Librorondo ni parolis pri vortoj kiuj havas diferencajn signifojn en Esperanto kaj en la gepatra lingvo.

Kompreneble mi ne povas raporti pri vorto en lingvo, kiun mi ne konas. Do, Pollando kaj Litovio, vi estas bonvenaj skribi artikoletojn pri viaj "falsaj amikoj".

- Svedoj povas miksi **ni** kaj **vi**. En la sveda "ni" signifas vi kaj "vi" (plurale) signifas ni. Francoj havas *nous* kaj *vous* en la sama ordo kiel en Esperanto.
- Por svedoj **semestro** (semester) signifas libertempo, ne studsezono.
- **Fiki** (fika) en la sveda signifas kafumi, kaj nenion alian. La origino estas cigana. Por ke homoj ne komprenu ilian parolon, ili ofte dividis vortojn kaj metis ilin inverse: fi-ka estis ka-fi = kafo.

- Nia angla partoprenanto diris: "Por mi **konvena** aŭ eĉ fojfoje **kunvena** memorigis min pri la angla 'convenient', sed kiam mi volas traduki 'convenient' en Esperanton, mi devas uzi **oportuna**. Do, ili estas laŭ mi nefidindaj amikoj. Krome, inter aliaj, **procedo, proceduro, proceso** kaj **procezo** ankoraŭ konfuzas min." Tro da signifa riĉeco??

- Juste nun mi (Siv) pensis pri la vorto **digitala** kiun mi erare uzas anstataŭ **cifereca**. **Digitalo** ja estas bela, sed venena floro.

/Siv



# Raporto el Gdansk de Elvira fine de majo

La suna kaj varma tempo finiĝis. La ĉielo estas griza kaj nuba. Al mi tio ne tro plaĉas, tamen la naturo aspektas kontenta – ĉio fariĝis tiel verda kaj aroma, ke malgraŭ pluvo agrable estas promeni.

Se temas pri novaĵoj – fine alvenis miaj najbaraj hirundoj. Lastan jaron mi pasigas kun birdoj – mevoj, kolomboj, paseroj kaj nun ankoraŭ hirundoj. Verdire unue mi ne komprenis kial ili tiom ekŝatis mian balkonon sed nun mi jam scias: – antaŭe la balkono estis protektata de miaj dombestoj hundoj aŭ

katoj. Nun kiam forpasis mia lasta hundo mi mem devas zorgi. Printempe sensukcese.

Mi tre ŝatas kontrolvizitojn de la pigo, kiu havas neston inter branĉoj de najbara acero. Post tia vizito dum kelkaj horoj kolomboj ne alvenas.

Mi vere ŝatas ĉiujn birdojn sed kolomboj terure malpurigas ĉion kaj post mia neatendo la mondo ekhavis du novajn kolombojn kaj mi grandegan laboron por uzebligi finfine mian balkonon. /Elvira Twardowska



## Vesperaj sonoj de birdoj ĉe rivero Göta Älv de Jan Hellström

### Fågelljud på kvällen vid Göta älv av Jan Hellström

*Drillsnäppa, Blankventra tringo (Pixabay)*

Vespere, la 3an de majo – vizito ĉe la boathaveno de Nödinge, norde de Gotenburgo.

Blankventra tringo venis flugante de la nordo al la boathaveno. Ĝi faris svingon norden denove.

Den 3/5 på kvällen – ett besök vid Nödinge båthamn, norr om Göteborg.

En drillsnäppa kom flygande norrifrån mot båthamnen. Den gjorde en lov uppåt igen.

En ensam kanadagås i älven norrut.

Sola kanada ansero estis ĉe la rivero norde.

Aroj de blankaj birdoj flugis suden.

Post la 21 h 30 ĉe la pluvkavetoj laŭlonge de la gruzvojo, sude de la haveno, oni aŭdis sonojn de ludado kaj logado (sonas kiel pikita porko) de akvoralo, tri ludantaj galinagoj kaj sporade ludanta porzano.

De la rivero aŭdiĝis platbeka anaso kaj pli fore malsupren al Stora Viken oni aŭdis la tipan sonon de vanelo. /Jan

Flockar med vitfågel drog söderut.

Efter 21:30 vid pölarna längs grusvägen söder om hamnen hördes spel- och lockljud (låter som en stucken gris) från en vattenrall, tre spelande enkelbeckasiner och sporadiskt en spelande småfläckig sumphöna.

Från älven hördes gräsand och längre ned mot Stora Viken tofsvipans karakteristiska ljud. /Jan



## Nyiragongo denove vomas lafon



### **Espoir Kasati** raportas:

Estas ruĝa lumoj kiu ĉiujn noktojn lumigas la ĉielon norde de Goma, urbo entenanta 600 000 loĝantojn kiuj travivas tre akutajn problemojn en la oriento de Resp. Dem. Kongo.

Nenio preterpasas Nord-Kivu, nek militoj, nek masakroj, epidemioj; sed por loĝantoj de Goma la vera infero troviĝas tie supre je altitudo 3770m, kie kuŝas lafo-lago en fuzio, densa fumo el magmoj kaŝiĝanta en Nyiragongo, ĝi estas vulkano kies rapideco atingas 100km/h.

La 22an de Majo 2021, je la 19a horo la vulkano Nyiragongo denove erupciis, ĵetis siajn lafojn, sepultis proksiman kvartalon Buhene kaj haltiĝis ĉe flughaveno iom proksime de Goma. 13 homoj mortis pro akcidentoj dum evakuado en la sama nokto, la loka civila societo asertis ke en la malsanulejo de Nyiragongo 24 homoj el kiuj 10 virinoj estis bruligitaj per fervoraj lavo kaj 40 plenkreskuloj restas netroveblaj. UNICEF sciigis ke pli ol 150 infanoj disiĝis disde iliaj familioj kaj timas ke 170 infanoj ĝisnune

### **Espoir Kasati** raportas:

Det är ett rött sken, som varje natt lyser upp himlen norr om Goma, en stad, som har 600 000 invånare, som genomlever mycket akuta problem i östra Demokratiska Republiken Kongo.

Ingen kommer förbi Nord-Kivu, varken krig, massakrer eller epidemier; men för dem som bor i Goma finns det verkliga helvetet där uppe på 3770 meters höjd, där det ligger en smältande lavasjö, med tjock rök och magma, som gömmer sig i Nyiragongo, en vulkan, vars lavahastighet når 100 km/h.

Den 22 maj 2021, kl 19 fick vulkanen Nyiragongo ett nytt utbrott och slungade ut sin lava, begravde det närmast liggande kvarteret Buhene och stannade först vid flygplatsen, ganska nära Goma. 13 personer dog under olyckshändelser under evakueringen samma natt. Den lokala civilbefolkningen påstod att 24 människor, därav 10 kvinnor, brändes ihjäl på Nyiragongos sjukhus p.g.a. den intensiva lavahettan och 40 vuxna saknas. UNICEF angav att fler än 150 barn skiljdes från sina

restas netroveblaj pro la vulkanerupcio de Nyiragongo-vulkano. Krome laŭ surlokalaj medioj: pli ol 3 629 domoj estis dezertigitaj per la lafoj, 23 tegmentoj forportitaj, la vojo Goma-Rutshuru detruita (ĉirkaŭ 2 km kovrita per lavoj), 3 malsanulejoj kaj 12 lernejoj cindritaj. Pli ol 20 000 personoj senhejmiĝis kaj nun troviĝas en publikaj haloj ne tuĉitaj per lavoj.

Tiunokte post erupcio, multega nombro de homoj forlasis siajn homojn kaj fuĝis al Saké, urbeto je 27 kilometroj okcidente de Goma, kaj alia granda homamaso forfuĝis al Ruando; aliaj iris al Ugando. Lafoj difektis inkluzive akvotubojn, elektrajn kablojn, kio plusuferigas homojn pro manko de pura akvo lasante la popolon en profunda mallumo.

La 23an de majo, lafoj ĉesis jam alflui, sed postsekvis forta tertremo kiu atingis magnitudon de 5,2. Cindraj nuboj kovras aeron, dum ĝi kapablas kaŭzi spirmalsanojn kaj ja jam kelkaj infanoj mortis pro tio. La urbo Goma registras pli ol 400 sismajn movojn, kio kaŭzas disfalojn de domegoj, kaj fendegojn al konstruaĵoj kaj sur vojoj.

Interalie oni konstatis ĉeeston de magmoj sub najbara lago (Kivu), kiuj povas varmigi lagan akvon plena je metana gaso kaj per tio povas kaŭzi gigantan erupcion. Nun ĉiuj loĝantoj en ĝia proksimeco nepre devas serĉi sekuran lokon por protekti sin, jen kvartaloj kiuj estas markitaj en danĝero: Majengo, Mabanga Nord, Mabanga Sud, Bujovu, Virunga, Murara, Mapendo, Mikeno, Kayembe kaj Volcan. Urĝas forlasi la urbon Goma, deklaris la militista Guberniestro Generala Leŭtenanto Constant Ndima Kongba. De tiam la urbo Goma ekis senhomiĝi, homoj ekfuĝis ĉiudirekten, iuj al Bukavu kaj Ruando, aliaj prenis direkton al Beni, Butembo, Kiwanja, ktp.

Ĝis nun la situacio restas observenda, ĉar plia vulkana minaco eblas en la postaj tagoj, nome vulkanologoj antaŭvidas ke magmoj akumuliĝinta sub la lago kaŭzos pliajn damaĝojn. Kompare kun la antaŭaj erupcioj, la ĉi-jara estis antaŭvidita kaj tio ebligis al

familjer och fruktas att 170 barn hittills är försvunna p.g.a. Nuiragongo-vulkanens utbrott. Vidare säger lokala medier att mer än 3 629 hus är ödelagda p.g.a. lavan. 23 tak har förts bort. Vägen mellan Goma och Rutshuru är förstörd (ca 2 km är täckt av lava), 3 sjukhus och 12 skolor är täckta av aska. Mer än 20 000 personer är hemlösa och finns nu i offentliga hallar, som inte nåtts av lavan.

Natten efter utbrottet, lämnade massor av människor sina hem och flydde till Saké, en liten stad 27 km väster om Goma och en annan stor människomassa flydde till Rwanda, andra tog sig till Uganda. Lavan förstörde vattenledningar och elkablar, vilket ytterligare plågade människor, som nu led brist på rent vatten och lämnade befolkningen i totalt mörker.

Den 23 maj, slutade lavan att rinna, men efterlämnade en kraftig jordbävning, som nådde en magnitud på 5,2. Askmoln är tjocka i luften och redan har några barn dött, drabbade av andningssjukdomar. Staden Goma registrerar mer än 400 seismiska skalv, vilket orsakar att stora hus faller samman och att det blir sprickor i byggnader och på vägar.

Bl.a. har man konstaterat förekomst av magma under den närbelägna sjön (Kivu), vilket kan värma upp vattnet, som är fullt av metangas, vilken kan orsaka ett enormt utsläpp. Alltså måste alla invånare i dess närhet söka sig till en säker plats, för att skydda sig. Här finns många områden, som betecknas som hotade: Majengo, Mabanga Nord, Mabanga Sud, Bujovu, Virunga, Murara, Mapendo, Mikeno, Kayembe och Volcan. Från dessa områden måste man lämna Goma, förklarade landsdelens generallöjtnant Constant Ndima Kongba. Sedan dess avfolkades Goma, människor flydde åt olika håll, en del till Bukavu och Rwanda, medan andra tog riktning mot Beni, Butembo, Kiwanja o.s.v.

Fortfarande måste man bevaka situationen, för framöver kan det bli fler vulkanrelaterade hot. Vulkanforskare förutser att den samlade magman under sjön kan förorsaka ytterligare

multaj foriri antaŭ ol ĝi erupcios, sekve lokaj aŭtoritatoj ne antaŭe preventis la popolon pri tiu ĉi erupcio, kio kulpigas ilin pro la okazintaj mortoj de Buhene-loĝantoj. Intertempe Goma-anoj de for en tendaroj observas ĝis eblas reveni siahejmen sed dume rekomenciĝis kelkaj laboroj sed timeme pro eventuala grandioza erupcio. /Espoir

espoirnaktivula@gmail.com  
espoirkasati@gmail.com



*Matene post lafofluo...*

skador. I jämförelse med tidigare utbrott, var årets utbrott väntat, och det gjorde det möjligt för många att ge sig av före utbrottet. Följaktligen är lokala myndigheter, som inte varnade folk för utbrottet, skyldiga till att Buhene-invånare dog. Nu observerar Gomabor långt borta i tältläger när det kan bli möjligt att återvända till sina hem. En del återuppbyggnad har påbörjats, men försiktigt, ifall det skulle bli ytterligare ett stort utbrott. /Siv översatte.



*...dum ĉiu fuĝas post ordono evakui.*



*Tio estas Buhene en teritorio Nyiragong.*



### **Ankaŭ Augustin Kkozwa sendis bildon:**

Li demandis al mi: Ĉu vi aŭdis pri erupcio de la vulkano en nia urbo Goma? Ĉu vi helpetus nin?

Li loĝas en Goma kaj instruas ĉirkaŭ 60 georfojn en la baza lernejo, ankaŭ pri Esperanto. Estas artikoloj pri kaj de Augustin en Ora Ĵurnalo en februaro kaj aprilo 2018. Laŭ bildoj en Facebook li kune kun la georfoj devis fuĝi por eskapi la vulkanan erupcion.



augukako@gmail.com

En la februara numero en 2018 ankaŭ estas artikolo pri alia kongolano, Joel Muhire. Li estas muzikisto kaj loĝas proksime al la limo de Ugando.

«La esperantistoj en Kongo Kinshasa estas multe pli junaj ol la esperantistoj en Eŭropo», Joel diras. Jes, li pravas. /Siv

## Pli pri la vulkana erupcio

De Henri Masson en FACEBOOK

***Urĝa alvoko** – Erupcio de la vulkano Nyiragongo, unu el la ses vulkanoj proksime de la urbo Goma, en Norda Kivu, DR Kongo, 22an de majo 2021. Mesaĝo en Esperanto kaj fotoj de Augustin Kkozwa, kiu aktivas kadre de la asocio Nova Familio:*

### Saluton gekaraj,

Eble vi aŭdis pri vulkana erupcio en nia urbo Goma. Nuntempe ni travivadas senĉesajn gravajn kaj fortajn tertremojn. Ili estas timigaj, do mi estas skribanta al vi dum tiuj tertremoj okazas.

Mi sendas fotojn montrantaj kiel estis forkurantaj Goma-anoj de tiu erupcio al Sake, nur 27 km for de Goma.

Mi sendas ankaŭ fotojn kiel mi vizitis la lokon kie fluis la lafoj kiu bruligis domojn.

Komprenu ke la lafo post la sekiĝo iĝas ŝtono, kiel tiu kiun mi enmane tenas.

Sekve de tiu erupcio hieraŭ kaj ĉi nokte multaj el niaj prizorgataj georfoj perdis ĉion: domojn, vestaĵojn, ŝuojn, kajerojn, ĉar la domoj bruliĝis, ili malsatas, ktp. Ĉu vi eble povus helpi por solvi tiun urĝan situacion? Ni estas kontakteblaj ĉe: [augukako@gmail.com](mailto:augukako@gmail.com) kaj [orfojkongo@gmail.com](mailto:orfojkongo@gmail.com)

Nome de ANF raportas Augustin kaj Betti.

### Fotoj de Augustin Kkozwa






## Tor – la Skandinava dio

Kiam la somero alvenas, eblas ke varma somertago subite ŝanĝiĝas kaj grandaj, malhelaj nuboj amasiĝas kaj malforta bruo aŭdiĝas malproksime.

Estas la terura vikinga Dio Tor, kiu vojaĝas kaj estas survoje inter la nuboj sur la firmamento. Eble li pensas pri la gigantoj kontraŭ kiuj li volas batali kaj detruiri. Aŭ estas la Midgorda serpento la celo por ilia batalo?

Tor vojaĝas per ĉaro tirata de du virkaproj, Tanngrjostur kaj Tanngrisnir, kiuj tiras kaj ili ankaŭ elspiras fajron tra la naztruoj kaj elfrapas fajrerojn per la hufoj.

Ĉirkaŭ la talio Tor estas vestita per la zono Megingjardir kiu donas al li grandajn fortojn. La armilo estas la martelo Mjølner kiu trafas ĉion, kion Tor celas, kaj kiel bumerango revenas.



La laboro de Tor estas defendi la homojn kontraŭ malsanoj kaj li ankaŭ gardas la tombojn. Ĵaŭdo estas nomita de dio Tor en multaj nordiaj landoj.

La malhelo malleviĝas kaj fulmoj kruciĝas sur la firmamento. Supre Tor batas per la martelo. La tondro estas tie... mi timas... /Ingegerd



### **Kio estas "Tondro"?**

Tondro estas aerelektra fenomeno kiu efektivas fortan malŝargiĝon, fulmojn, aŭ inter nuboj aŭ inter nubo kaj tero. La kaŭzo de tondra vetero estas fortaj suprenturnantaj ventoj kiuj kaŭzas fortajn kosmajn ŝargadojn en malsamaj partoj de, ofte tre altaj, nuboj.

## **Afrika savano en Skanio EN AFRIKANSK SAVANN I SKÅNE**

*Jan Hellström*





Saluton!

La 7an de majo sentis kiel oni estus translokigita al afrika savano, kiam miloj da blankvangaj anseroj leviĝis de la kampoj de Vomb, por tuj poste denove surteriĝi.

La kaŭzo ke ni estis du esperantistoj (mi kaj Margareta) en vizito tie, estas ke du himantopoj estis observitaj. En Eŭropo ili kutime kovas idojn en la Mediteranea areo kaj travintras en Afriko.

Krom la delikataj himantopoj, estis pliaj birdobservoj. Ruĝa milvo flugis super la areo, krieg-ŝterno preterpasis super ni, murhirundo serĉis nutraĵon, du junkokanbirdoj sidis kantante ĉe vojfosajo, same faris kanemberizo. Ruĝkrura tringo kaj brovtringo kantis.

Oni aŭdis kelkajn flavajn motacilojn logvoki. La kampalaŭdo trilis. Arbarkolombo preterflugis je la rando de la arbaro. Sur akvosurfaco kuleranasa paro kaj du avocetoj naĝis.

En la areo estis 12 orpluvioj kaj ĉirkaŭ 50 grizaj tringoj. Ĉiĉafoj, fitisoj kaj fringoj kantis en la proksimeco de la parkejo kaj ĉe la vojrandoj sidis buteo.

Estis fruktodona vizito malgraŭ pluvegoj kaj foje hajlo.

Salutojn de Jan



## Namibio kaj ni

de Carl-Olof Selenius

La geografia distanco estas longa, sed kulture ni similas, la popoloj en Namibio kaj la nordiaj landoj. Dum du jarcentoj kulturoj fluis, plejparte tiel, kiel oni nomas kulturimperialiste.

Jen la pupo sur la bildo. Kvazaŭ paska sorĉistino ŝi aspektas. Herera virino ŝi estas. Virinoj de la herero-popolo ofte vestas sin ĉi-tiel, per korno-ĉapelo kaj krinolino-robo. La hereroj iam estis tre influa grupo en la lando kiun ni nun nomas Namibio. Antaŭ

Hej!

Den 7/5 kändes det som att vara förflyttad till en afrikansk savann, när 1000-tals vitkindade gäss lyfte från Vombs ängar, för att strax efteråt landa igen.

Orsaken till att vi var två esperantister (jag och Margareta) på besök där, var att ett par stytlöpare observerats. I Europa häckar de vanligtvis i Medelhavsområdet och övervintrar i Afrika.

Förutom de fina stytlöparna blev det ytterligare ett antal fågelobservationer. Röd glada flög över området, en skrântärna passerade över oss, en hussvala födosökte, två sävsångare satt vid ett dike och sjöng liksom en sävsparv. Rödbena och grönben spelade.

Flera gulärlor hördes locka. Sånglärkan drillade. En skogsduva flög förbi vid skogskanten. På en vattenyta ett skedandpar och två skärfläckor.

I området 12 ljungpipare och cirka 50 gluttsnäppor. Gransångare, lövsångare och bofink sjöng i närheten av parkeringen och vid vägkanten satt en ormvråk.

Ett givande besök trots skurar av regn och hagel ibland.

Hälsningar

Jan

160 jaroj ili elektis svedan komerciston, Karl Johan Anderson, kiel sian ĉefan militkomandanton. La svedoj en tiuj jaroj estis la plej multnombra eŭropdevena grupo en Namibio. Ĉe unu okazo en la 19-a jarcento, 70 el 120 eŭropanoj en Namibia estis de Vänersborg.

Poste, kiam Karl Johan jam estis morta, Otto von Bismarck, la germana regna kanceliero, deklaris, ke Germanio havu Namibion kiel kolonion. En 1905, post plurjaraj bataloj la hereroj estis venkitaj kaj tute subigitaj. Eble duono de la herera populacio mortis. Tiuj, kiuj transvivis tiun genocidon ne plu rajtis vivteni sin kiel paŝtistoj kaj bredistoj de bovoj kiel antaŭe. Ili estis malliberigitaj. Ĉiuj dum kelkaj jaroj vivis en koncentrejoj. Tiuj, kiuj transvivis ankaŭ tiujn, nur rajtis perlabori kiel servistoj ĉe koloniistoj. Dum longa periodo akraj leĝoj kontraŭ vagistoj (sv. lösdriverilagar) kaj leĝoj kontraŭ posedo de bruto devigis ĉiujn hererojn vivi en tre proksima kontakto kun eŭropdevenaj familioj. Tiam la herero-virinoj adoptis la vest-stilon porti krinolinon, laŭ eŭropa virina modo tiama. (Aŭ ĵus-tiama; ni povas imagi, ke mastrinoj donis siajn eksmodajn vestojn al siaj servistinoj). Ankoraŭ tre multaj herero-virinoj vestas sin tiel, ne nur por specialaj festenaj okazaĵoj sed ĉiutage.

### **Boŝmanoj – niaj pragepatroj?**

Ne nur hereroj kaj germanoj havas komplikan relaton pro la historio. Kvankam la loĝantoj estas nur du miljonoj, la etnaj grupoj en Namibio estas multaj. Unu estas la Sanpopoloj aŭ boŝmanoj. Oni konsideras ilin la plej praa popolo, unue pro tio ke ili loĝis en la lando dum miloj da jaroj antaŭ ol venis ĉiuj aliaj popoloj – kaj eŭropdevenaj kaj bantuaj, due pro tio ke ilia vivmaniero ne estis tuŝita de la "neolitika revolucio", kiu okazis antaŭ multaj miloj da jaroj, kiam preskaŭ ĉiuj homoj en la mondo komencis agrikulturi kaj bredi. Komenci kulturi la teron estas eble la plej

grava ŝanĝo, kiun la homaro iam spertis. Oni konsideras tiun okazon la limlinio inter fruaj partoj de la ŝtonepoko kaj la nova parto, neolitiko.

Longe boŝmanoj vivis laŭ tia antaŭ-neolitika vivmaniero, kiel ĉasistoj kaj kolektistoj. Nuntempe ne plu estas ekzakte tiel. Boŝman-turistoj venas por vidi la naturan staton de la homaro. Kompreneble "vivi tradicie" ne vere estas vivi tradicie, se oni faras tion kiel turist-entreprenisto aŭ dungito de turista kompanio.

### **Lingvo facile lernebla – por svedoj**

Ŝajnas, ke kelkaj el la boŝmanoj adoptis vivstilon de kaprobredado jam antaŭ mil jaroj, kaj ili fariĝis aparta etna grupo, la "hotentotoj". Zamenhof uzis tiun nomon, kaj la Plena Ilustrita Vortaro uzas ĝin sen komenti, ke ĝi povus esti ofenda nomo, sed Vikipedio havas artikolon pri la nomo, asertante ke la ekzemplo de la Zamenhofa uzo de la vorto indikas ke "hotentoto" jam tiam estis ne-neŭtrala nomo. Nuntempe en Namibio la vorto *hottentott* – ĉu uzite angle aŭ afrikanse, aŭ en alia lingvo – ne estas konsiderata kiel akceptita termino. La modernaj – neofendantaj – terminoj, proponitaj en Vikipedio estas "kojoj" aŭ "kojkojoj", kio estas laŭ internacia maniero, kaj laŭ sudafrika maniero. (La nomo "kojo" tamen estas problema, ĉar Vikipedio uzas "koja lingvo" pri tute alia lingvo, pri lingvo parolata en Barato.)

En Namibio oni nomas la kojkojojn "nama". Laŭ Vikipedio la esperanta nomo estas "namo". Plej multaj nomoj en Namibio nuntempe havas du lingvojn: unu, la "nama lingvo", similas al boŝman-lingvoj, la alia similas al la nederlanda. La Nederlando-devenan lingvon oni nomas afrikansa. Afrikansa estas tre grava lingvo, kaj en Sudafriko kaj en Namibio, parolata de multaj grupoj.

Por svedoj la afrikansa lingvo estas facile lernebla – kiel Esperanto. Multaj el la vortoj oni jam komprenas. Ĝi estas kiel sen-gramatika germana kun svedaj kaj anglaj vortoj. Eble vi suferis en la lernejo pro der-die-das – en la afrikansa ĉiuj vortoj estas die: Die svart hund, die jong man. Alle mense wil in vrede leef. (La nigra hundo, la juna viro. Ĉiuj homoj volas vivi en paco.)

### **Ovamboj kantas miajn melodiojn**

Mi mencios ankoraŭ unu lingvogrupon, la plej grandnombran. Pli ol 50 procentoj ili estas, se oni kalkulas ok dialektojn kune. Ili nomiĝas kolektive ovambo. Kulture ili estis tre forte influitaj de finnlandaj luteranaj misiistoj. En lernejoj kaj preĝejoj ovambaj homoj kantas himnojn verkitajn de Johan Ludvig Runeberg kun muziko de Fredrik Ehrström, la samajn kantojn, kiujn mi mem kantis kiel infano en lernejo en Finnlando. "Från molnets purpurstänkta rand" mi kantis. La tradukitan tekston mi ne scias, kvankam mi aŭdis ĝin tre ofte dum mia vivo en Namibio. "Jag sitter, källa, vid din rand", estas ĉiutaga matenkanto en multaj lernejoj. Alia populara himnverkisto estas Lars Torstensson Nyberg de Svedio.

Ovambaj virinoj havas nomojn kiel Aina, Alma, Helmi, Hellin, Hilma, Laina, Hulda, Hilda. De viraj nomoj, kelkaj estas finn-devenaj, kiel Toivo kaj Eino, sed plej multaj viroj havas bibliajn nomojn: Josua, Sebedeus, Jesaja, Nehemja, Esra, Josua, Aron, Gideon, Esau.

La situacio de la ovamboj ankaŭ estas determina de la unua mondmilito. Germanujo malvenkis kaj perdis siajn koloniojn. Ĝi devis doni Namibion al la Ligo de Nacioj, kiu donis ĝin kiel protektoraton al Britujo, kiu donis ĝin al Sudafriko, kiu poste fariĝis rasisma ŝtato, kiu forte kontrolis Namibion, laŭ la apartismaj leĝoj, same kiel Sudafrikon.

Nur unu parton de Namibio la novaj regantoj ne povis kontroli strikte: la plej nordan

parton, kie loĝis la ovamboj. Inter la du partoj estis starigita ia barilo, la Lindekvist-barilo, supozeble por kontroli, ke brutaro en la suda, kontrolita, parto ne estu infektita de bovomalsanoj el la sovaĝa norda parto. Iom post iom homoj komencis dubi pri la intenco pri la barilo: Eble ne pro veterinara kaŭzo ĝi estis starigita, sed efektive por kontroli la popolon, ke ovamboj ne havu interrilaton kun homoj en la sudo de la lando. En la prospera suda parto, perpolice kontrolita, hereoj, namoj kaj aliaj vivis sub striktaj reguloj. Ovamboj ne eĉ rajtis eniri tien. Ili do fariĝis duoble subaj.

### **Forbaritoj kaj ekzilitoj revenas**

Sed la historio estas ironia. Post jardekoj, la forbaritaj ovamboj – ekzakte pro sia ekstereco, sia ne-inkluditeco – fariĝis la precipa liberiganto de la tuta Namibio. La ovamboj sukcesis forigi la sudafricanan koloniisman reĝimon. En sia longedaŭra milito ili havis helpon de sia proksimo al Angolo, kies liberiga movado jam antaŭe sukcesis venki la portugalan koloniismon. Aliaj namibiaj grupoj ne sukcesis fari tiom multe. Ili estis tro forte kontrolitaj de la sudafricanaj armeo kaj polico kaj kolonia administracio.

Verdire ankaŭ herero-junuloj sukcesis iri eksterlanden, ili eĉ sukcesis havi militan trejnadon, sed pli ili ne sukcesis. Ili komprenis, ke ili estus tuj kaptitaj se ili provus reeniri en Namibion. Post jaroj multaj el ili trovis sin en kelkaj svedaj kaj germanaj universitat-urboj, unue kiel studentoj, post jardekoj kiel kleruloj, dum iliaj ovombaj "necivilizitaj" samlandanoj liberigis la landon.

Post la liberigo, kiu okazis en 1990, la hereroj, germanoj, boŝmanoj, namoj, ovamboj kaj aliaj grupoj kun tre diversaj lingvoj, historioj, spertoj kaj vivmanieroj devis trovi manierojn por kunlabori. Grupoj, kiujn apartigaj leĝoj longe disbaris unu de alia, devis trovi taŭgajn vojojn por iri kune. Esperanton ili neniam konsideris kiel rimedon por unuiĝi. Ili elektis la anglan kiel sian komunan lingvon. Tre

penega estis la proceso, kiam ĉiuj lernejoj komencis uzi tiun nordeŭropan lingvon, kiun antaŭe preskaŭ neniu uzis en Namibio. Nek

instruistoj, nek lernantoj sciis ĝin. Sed ili sukcesis. Mirakloj okazas de tempo al tempo.

Carl-Olof Selenius

## Ekvidetoj el mia fotosemajno en majoj GLIMTAR FRÅN MIN FOTOVECKA I MAJ

Naturfotograf/Naturfotisto

**Renate Säfström**

Hemsida/Hejmpaĝo

[www.fotoforlivet.com](http://www.fotoforlivet.com)



*Laŭlonge de la marbordo la longdistance translokiĝanta arkta ŝterno kovas idojn.  
Ĝi flugas de poluso al poluso, de Antarkto ĝis Arkto. /  
Längs kustremsan häckar den långflyttande silvertärnan. Den tar sig från pol till  
pol, från Antarktis till Arktis.*

Ankoraŭ unu fojon mi staras ĉi tie ĉe la okcidenta marbordo de Öland, ĝuante la flugantan birdaron survoje norden al siaj kovadlokoj.


Estas bela vespero en majoj kaj la suno estas survoje suben kontraŭ la horizonto en la okcidento.

La varma lumo kolorigas la pejzaĝon per oraj nuancoj kaj en la bosko malantaŭ mi aŭdiĝas laŭta kaj stranga kanto.


Ännu en gång står jag här vid Ölands västra kust och njuter av att se fågelsträck på väg norrut mot sina häckningsplatser.

Det är en vacker kväll i maj och solen är på väg ner mot horisonten i väster.


Det varma ljuset färgar landskapet i gyllene toner och i dungen bakom mig hörs en ljudlig och säregen sång.



Arktaj ŝternoj duope – ammanĝaĵo!  
Silvertärnor på tu man hand – kärleksmåltid.



Arkta ŝterno estas amindumata per fiŝo.  
Silvertärna blir uppvaktad med fisk.



Fiŝkaptanta arkta ŝterno.  
Fiskande silvertärna.

Ĉi tiun belan grizan cirkuon mi renkontis en Alvaret en norda Öland.


Por gardi kaj protekti la grizan cirkuon, kiu estas minacata de ekstermo, la gubernia administracio gvidas projekton en Öland.

Ĉi tiu griza cirkuo nomiĝas Gösta kaj travintris en Tchad en Afriko. Tion oni scias, ĉar ĝi estas markita kaj havas etan dissendilon surdorse.

Denna vackra ängshök mötte jag på Alvaret på norra Öland.

För att bevara och skydda ängshöken, som är utrotningshotad, driver länsstyrelsen ett projekt på Öland.

Denna ängshök heter Gösta och har övervintrat i Tchad i Afrika. Det vet man eftersom den är märkt och har en liten sändare på ryggen.



le, tie, kaŝas sin la "nevidebla birdo", la najtingalo. Ĝi estas malfacile videbla, sed la kanto estas aŭdebla en preskaŭ ĉiu bosko sur la insulo. Estas vespere kaj nokte, kiam la najtingalo kantas sian kanton, kiu enhavas ritman ŝmacon, klaketon, kastanjete raslan sonon inter flutsonoj kaj fajfiloj.

Kiam mi aŭskultas ĝin, miaj pensoj flugas al alia kanto kun la teksto: "Oni ne devus dormi" ..., kiun Helen Sjöholm kantas.

Ne, oni ne devus dormi en majoj, estas tro multe magia!

Där nästan gömmer sig "den osynliga fågeln", näktergalen. Den är svår att få syn på men sången hörs i var och varannan skogsdunge på ön. Det är på kvällen och natten som näktergalen sjunger sin sång som innehåller rytmiskt smackande, knäppande, kastanjettskallrande ljud bland flöjttoner och visslingar.

När jag lyssnar på den flyger mina tankar till en annan sång med texten "Man borde inte sova..." som Helen Sjöholm sjunger.

Nej! man borde inte sova i maj, det är alldeles för fantastiskt!


Mi restas en Öland dum unu semajno kaj estos tagoj kun riĉaj travivaĵoj kaj mirindaj fotoj.

Jag stannar på Öland en vecka och det blir dagar rika med upplevelse och härliga foton.

**Renate Säfström**



## La manĝaj eventoj de la jarmilo en Svedio



### Årtusendets mathändelser i Sverige

La 11a jarcento **Salo** estas pli kaj pli serĉata de la supera klaso. La salo estis ĉefe uzata por konservado.

La 12a jarcento **Kolbaso** estas la plej malnova viandaĵo de la mondo. Salitan kaj fumajtan kolbason oni komencis produkti jam dum la 12a jarcento.

La 13a Jarcento **Rapojn** oni laŭ leĝo devige devas kultivi. Kiam oni serioze komencis kultivi terpomojn dum la 19a jarcento, tio estis la fino por la rapoj.

La 14a jarcento **Haringo**. Dum la unua duono de la 14a jarcento haringoj abundis. Enormaj kvantoj eniris la plej enajn partojn de la arkipelagoj, kie oni facile kaptis ilin.

La 15a jarcento **Kuirlibroj**. Manskribitaj francaj kuirlibroj troviĝas de la fino de la 14a jarcento. En 1474 la unua printita kuirlibro venis en la itala.

1000-talet **Salt** blir en alltmer efterfrågad vara bland överklassen. Saltet användes i första hand till konservering.

1100-talet **Korv** är världens äldsta charkuterivara. Spickekorv, en av de första svenska korvarna började göras redan på 1100-talet.

1200-talet **Rovor** måste odlas enligt lag. När potatisen började odlas på allvar under 1800-talets början innebar det slutet för rovarna.

1300-talet **Sill**. Under första hälften av 1300-talet fanns det mycket gott om sill. Enorma mängder gick in i innerskärgrårdarna, där den var lätt att fånga.

1400-talet **Kokböcker**. Handskrivna franska kokböcker finns från slutet av 1300-talet.

La unua sveda kuirlibro aperis en 1642, sed la plej konata, "Hjelpreda" (Helpilo) de Cajsa Warg aperis nur en 1755.

La 16a jarcento **Fermentinta baltharingo.** Meze de la 16a jarcento por la unua fojo estas skribita pri fermentinta baltharingo en impostregistro. Ĉiu 15a barilo de fermentinta baltharingo estus donenda al la ŝtato.

La 17a jarcento **Kafo.** Fine de la 17a jarcento la unua kafo venas al Svedio. La trinkaĵo estis malpermesita, sed riĉeguloj povis ricevi specialan licencon kuir kaj trinki kafon.

La 18a jarcento **Terpomoj.** Jonas Alströmer metas la unuan terpomon en svedan teron en 1724. Sed terpomoj estis kultivataj prove jam en 1650 en Upsalo.

La 19a jarcento **La stovo, hejtita per ligno** anstataŭas la fajrejojn. Kukoj al la kafo rapide populariĝis.

La 20a jarcento La unua **bananŝipo** venas en 1909 al Svedio kaj Gotenburgo. La postulado fariĝis tiom granda, ke multaj vendejoj enmetas limojn de maksimume po du bananoj por persono.

La antaŭan jaron la germana dommastrino Melitta Benz inventis la **kafofiltrilon**.

La 1910-aj jaroj La unua **kristnaska bufedo** estas surtabligita. Per anonco de restoracio kristnaskon 1919 la nomo kristnaska bufedo estas nomita.

1920aj jaroj Oni komencas vendi **freŝajn tomatojn** en Svedio.

1930aj jaroj Oni komencas fari **keĉupon** el tomatoj.

**Parcelaj ĝardenetoj** estas aranĝitaj (sed ili ja troviĝis jam dum la unua mondmilito!?).

1940aj jaroj La milito limigis la komercon. **Konservaĵoj** fariĝis la savo por multaj.

1950aj jaroj **Pastaĵoj kaj hakviandaĵo** troviĝas. **Spagetoj kaj saŭco de muelita viando** populariĝas.

1474 kom den första tryckta kokboken på italienska.

Den första svenska kokboken kom 1642, men den mest kända, Cajsa Wargs "Hjelpreda", kom först 1755.

1500-talet **Surströmming.** I mitten av 1500-talet står det för första gången om surströmming i en skattelängd. Var femtonde tunna surströmming skulle lämnas till staten.

1600-talet **Kaffe.** I slutet av 1600-talet kommer det första kaffet till Sverige. Drycken förbjöds men riktigt rika kunde få särskild licens att tillaga och dricka kaffe.

1700-talet **Potatis.** Jonas Alströmer sätter första potatisen i svensk jord 1724. Men potatis odlades på försök redan ca 1650 i Uppsala.

1800-talet **Vedspisen.** Vedspisen ersätter öppna härdar. Kaffebröd blir snabbt populärt.

1900-talet Den första **bananbåten** kommer 1909 till Sverige och Göteborg. Efterfrågan blir så stor att många affärer inför begränsningar på max två bananer per person.

Året innan, 1908 uppfann den tyska hemmafrun Melitta Bentz **kaffefiltret**.

1910-talet Det första **julbordet** dukas upp. I en annons för en restaurang julen 1919 nämns ordet julbord.

1920-talet **Färska tomater** börjar säljas i Sverige.

1930-talet Man börjar göra **ketchup** av tomater.

**Koloniträdgårdar anläggs** (men de fanns ju redan under första världskriget?).

1940-talet Kriget begränsade handeln. **Konserver** blev räddningen för många.

1950-talet **Pasta och hamburgare** kommer. **Spaghetti och köttfärsås** blir populärt.



1960aj jaroj Stokholmo ricevas sian unuan **picrestoracion**. **Ajloj kaj tomatoj** multe vendiĝas.

1970aj jaroj **Ekzotikaj fruktoj** populariĝas. La plej populara spico estas **verda pipro**.

1980aj jaroj **Freŝaj olivoj** vendiĝas. **Tako** estis enkondukita en 1986.

1990aj jaroj La spico **kapsiketo** populariĝis. Ni uzas fortajn spicojn. **Vegetaraĵoj** fariĝas pli kaj pli manĝataj, kiam pliaj pridubas nian rajton manĝi bestojn.

**Kio ĝis nun venis dum la 21a jarcento?** /Siv

1960-talet Stockholm får sin första **pizzeria**. **Vitlök och tomater** säljs mycket.

1970-talet **Exotisk frukt** blir på modet. Populäraste kryddan: **grönpeppar**.

1980-talet **Färska oliver** säljs. **Tacos** introduceras 1986.

1990-talet **Chili** blir på modet. Vi använder starka kryddor. **Vegetarisk mat** blir allt vanligare i takt med att allt fler ifrågasätter vår rätt att äta djur.

**Vad har kommit på 2000-talet?** /Siv

## "Kroppkakor"

"Korpkukoj" – sveda tagmanĝaĵo

Kuiritaj terpombuloj farĉitaj per lardkubetoj kun fandita butero kaj konfitaĵo de vakcinioj.

4–5 porcioj

1 kg terpomoj, kuiritaj

1 ovo

1 kulereto da salo

proksimume 3 decilitroj da tritika faruno

**Farĉo:**

300 gramoj da iomete salita ŝultra aŭ flanka lardo

1,5 kuleretoj da pulvorigita pimento

2 spicmezurunuoj da ĵus muelita nigra pipro

Senŝelu la terpomojn kaj boligu ilin dum 20 minutoj.

Premu la terpomojn en pelvo kaj lasu malvarmiĝi.

Kunmiksi terpomojn, ovon, salon kaj farunon al stabila pasto. Unue en pelvo, kaj poste sur farunŝmirita laborbenko. Partigu la paston en 16 pecojn kaj formu al bulkoj.

Tranĉu la lardon en malgrandajn kubojn kaj fritu en pato en sia propra graso. Spicu kun



**Kroppkakor med skirat smör**

Favoriternas favorit när det kommer till husmanskost, om ni frågar oss! Servera dem varma med skirat smör och råbäda lingon... Det blir inte bättre än så!

AV CHRISTINA ASPLUND FOTO: THOMAS CARLEN

4–5 portioner:  
1,3 kg potatis av mjölig sort  
1 ägg  
1 tsk salt  
ca 3 dl vetemjöl

**Fyllning:**  
300 g nymmat bop- eller skinka  
1 1/2 tsk färsatt kryddpeppar  
2 tsm nymmat svartpeppar

**Kokning:**  
ca 4 liter vatten  
1 msk salt

**Servera med:**  
skirat smör, se receptet  
råbäda lingon  
råkostallad

1 Skala och koka potatisen mjuk, ca 20 minuter. Häll av vattnet. Pressa potatisen i en bunke och lätt den malna råg.

2 Blanda potatis, ägg, salt och mjöl till en fast deg. Först i bunken och sedan på mjölad arbetshink. Forma degen till en rulle. Dela rullen i 16 bitar och forma bitarna till runda ballar.

3 Fyllning: Skär fläsket i små tärningar och stek det i en stekpanna i siktat fett. Krydda med kryddpeppar och svartpeppar. Gör en

gruppi potatisballen och lägg i en sked fyllning. Vik över degen och rulla till en boll.

4 **Kokning:** Koka upp vatten och salt i en stor gryta. Lägg i kroppkakorna och låt dem sjuda tills de flyter upp och koka i ytterligare 3 minuter. Ta upp kroppkakorna med en hållare. Servera med skirat smör, råbäda lingon och råkostallad.

**Skirat smör!**  
Smält 100 g smör i en kastrull. Låt kastrullen stå vid sidan av plattan, ca 5 minuter. Då delar smöret sig i ett fett- och ett vattenlager och det är det smögula fettet som ligger sig överst som man använder. Häll smöret i en förvärd süssnäpa.

pimento kaj nigra pipro. Faru fosojn en la bulkoj. Metu la farĉon en la fosojn kaj faldu la paston supren.

Boligu akvon kaj salon en kaserolo. Enmetu la bulkojn kiam la akvo kaj salo ekbolas. Lasu boleti ĝis la bulkoj malmergiĝas kaj bolu dum pliaj 3 minutoj.

**Fandita butero:**

Fandu la buteron, 100 gramojn, en kaserolo. Ŝovu la kaserolon flanken for de la fajro dum kvin minutoj. Tiam la butero disiĝas en unu tavolon de butero kaj unu tavolon de akvo.



## La bongusta tubero de Alingsås

### Den goda knölen från Alingsås

*La placo de Alingsås kun busto de Jonas Alströmer.*

Estas malfacile imagi Svedion sen terpomoj. Sed terpomoj ne ĉiam troviĝis en Svedio.

En 1724 Jonas Alströmer komencis por la unua fojo kultivi terpomojn por uzi ilin kiel manĝaĵon. Tion li faris sur sia bieno Nolhaga en Alingsås.

La terpomplanto troviĝis en Svedio pli frue – sed tiam kiel dekoracian planton en botanika ĝardeno en Upsalo, sed manĝi la radiktuberojn neniu provis antaŭe.

Alströmer estis regalita per terpomoj dum siaj vojaĝoj en Eŭropo. Tial li ekhavis la ideon instrui al la svedoj manĝi terpomojn.

Origine la terpomplantoj venis el Sudameriko, sed en la 16a jarcento hispanoj kunportis ilin al Eŭropo. Ili eksciis ke terpomoj estas utila manĝaĵo. Se oni manĝas terpomojn, oni evitas la teruran malsanon skorbuton. Terpomoj ja plenas de C-vitaminoj. Kiam li asertis, ke terpomoj bongustas, multaj svedoj kuntiris la nazojn, dubante.

La svedoj daŭre manĝis rapojn kaj napojn. Daŭris multajn jarojn, ĝis la komenco de la 19a jarcento, antaŭ ol oni lernis ŝati la terpomojn. La urbo Alingsås iom post iom fieris pro sia Jonas Alströmer.

La homoj en Alingsås nomis sian urbon "La urbo de terpomoj" kaj metis buston de Jonas Alströmer sur la Granda Placo.

Estas la butero plej supre, kiun oni uzas. Verŝu la buteron en varmigita saŭcujo.

Bonan apetiton.

/Ingegerd

Det är svårt att tänka sig Sverige utan potatis. Men potatis har inte alltid funnits i Sverige.

År 1724 började Jonas Alströmer för första gången odla potatis för att använda den som mat. Det gjorde han på sin gård Nolhaga i Alingsås.

Potatisplantan hade funnits i Sverige tidigare – men då som prydnadsväxt i en botanisk trädgård i Uppsala, men att äta rotknölnarna hade ingen försökt tidigare.

Alströmer hade blivit bjuden på potatis under sina resor i Europa. Det var på så sätt han kom på idén att lära svenskarna äta potatis.

Ursprungligen kommer potatisväxten från Sydamerika, men på 1500-talet förde spanjorer den med sig hem till Europa. De kom på att potatis var nyttig mat. Om man åt potatis, slapp man den hemska sjukdomen skörbjugg. Potatis är nämligen full av C-vitaminer. När han påstod att potatis smakade gott, var det många svenskar, som rynkade på näsan och tvivlade.

Svenskarna fortsatte att äta rovor och kålrötter. Det tog många år, till början av 1800-talet, innan man lärde sig att tycka om potatisen. Staden Alingsås blev så småningom mycket stolt över sin Jonas Alströmer.

Jonas Alströmer estis ideriĉa viro, kiu okupiĝis pri multaj aferoj. Li ankaŭ kunportis vicon de diversaj maŝinoj kaj teksmaŝinoj al Svedio. Tio necesis por fondi la svedan teks-industrion. Do, Jonas Alströmer kunhelpis ke Alingsås fariĝis unu el la plej gravaj tekslokoj de la lando.

Tamen plej fama li certe estas pro tio, ke li instruis al la svedoj manĝi terpomojn. /Siv

Folket i Alingsås kallade sin stad för ”potatisens stad” och de ställde en byst av Jonas Alströmer på Stora torget.

Jonas Alströmer var en iderik man, som sysslade med många saker. Han hade också fört en hel rad olika maskiner och vävstolar till Sverige. Det behövdes för att bygga upp den svenska textilindustrin. Alltså hjälpte Jonas Alströmer till att göra Alingsås till en av landets viktigaste textilorter.

Fast mest känd är han säkert för att han lärde svenska folket äta potatis. /Siv

## Esperanto kaj naciismo

Jagoda Greger skribas en Facebook post zoom-kunveno la 11an de majo en 2021 kun la pola klubo Toronto. La temo estis:

### ESPERANTO KAJ NACIIISMO

Ĉu esperantisto povas esti naciisto? La respondo estas simpla: Jes. Sed por plua diskuto, necesas difini, kio estas esperantisto kaj kio – naciisto. Unu el la plej gravaj dokumentoj de la Esperanto-movado estas tiel nomata **Bulonja Deklaracio** akceptita dum la unua Esperanta en Kongreso Bulonjo-sur-Marco en la jaro 1905. Ĝi entenas jenan paragrafon: *Esperantisto estas nomata Ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas.* Tamen ankaŭ la ideologia koncepto trovis lokon en la deklaracio kaj estis nomita la interna ideo.

L.L.Z. malaprobis naciismon. Rifuzis membriĝon al Juda Nacia Ŝtato.

Esperanto-Asocio **Roman Dmowski** diris:

Naciismo estas obstina baro, dividanta la homan familion. Ĝi radikas en diversaj kampoj de la homa socio, kiel politiko, ekonomio, kulturo, religio. Naciisto



malrespektas ĉion, kio ne estas lia kaj altrudas al aliuloj la sian. Li malamas ĉion diferencon, naskas ksenofobion, rasismon kaj malamon. Naciisto konsideras ĉion sian la plej bonan, ne toleras kritikon. Li ne interesiĝas pri fremdaj valoroj kaj tiel firmas sian orgojlon. Naciisma sinteno kontraŭstaras la principon de egaleco. Se mankas dialogo, kreskas malamo, kiu transformiĝas en krimon. Naciismo pare kun rasismo generis genocidon. Naciismo kreis Nurenbergan Leĝon, kiu agnoskis la ideon de arjoj kaj nearjoj.

Patriotismo kultivas sian kulturon, sed ne trudas ĝin al aliuloj, kaj respektas fremdan kulturon.

Ĉu vi havas komenton? /Siv

## Fabelo pri io



Iam, iu kato ĉasis en la arbaro.  
Iu viro multe laca,  
dormis en la lito.

Ial li revis pri belaj floroj,  
ĉar en ies ĝardeno floroj kreskis.  
Ilo aŭdas inter la floroj,  
ie la eta muso iel kaŝas sin en  
la flora kaŝejo.

La kato, forte ekmaŭis el la arbaro!  
La muso, ektimas en la florbedo!  
La viro, ekvekiĝis en la lito!

La viro estis kuranta kun ia fosilo  
kontraŭ la arbaro!  
Iel li tenas la fosilon super la kapo.  
Ie en la florbedo la muso vidas la viron,  
ĉasi la katon per fosilo.


La muso estis malsovaĝa kaj manĝis  
iom da ĝermantaj semoj el la tero, ial estis kvieta ie,  
kaj la viro estis survoje ien...

Fine fino!

# Pri 99

de  
Yukihiro DoiEsperanto

En la ĉina, japana kaj korea ankaŭ  
99 estas naŭdek naŭ (九十九).



## Algebra seriokolizio

de Lasse Granat

En leciono de matematiko, la instruisto donis  
la sekvan problemon al siaj lernantoj:

Sur fervoja linio inter du stacioj situantaj 200  
kilometrojn aparte, trajno ekiras de stacio A  
kun rapideco de 80 km/h, samtempe alia  
trajno ekiras de stacio B je 120 km/h.

Abelo sidas sur la fronto de trajno A kaj,  
samtempe kun la trajno ekiras, la abelo  
ekflugas laŭ la fervojo kun rapideco de 150  
km/h. Kiam la abelo renkontas trajnon B, ĝi  
returniĝas kaj flugas malantaŭen kun la sama  
rapideco ĝis ĝi denove renkontas trajnon A,

tiam ĝi denove turniĝas al trajno B, ktp. ĝis la  
du trajnoj kolizias.

Nun la instruisto petas la lernantojn fari  
algebran serion de la distancoj, kiujn trapasis  
la abelo, por povi sumigi ilin kaj tiel determini  
la tutan distancon, kiun la abelo flugis antaŭ  
ol ĝi estis dispremita. La instruisto nun  
pensis, ke dum la cetera leciono li povos fari  
iun alian laboron, sed tio ne okazis.

Inteligenta knabino diris:

– Se ni faros tion kiel algebra serio, la trajnoj  
kaj la abelo neniam renkontiĝos, ili nur  
proksimiĝos senfine unu al la alia. Mi tamen

diras, ke ne gravas kien flugas la abelo. La tuta distanco estas 200 km, la trajnoj proksimiĝas je  $120+80$  km/h, do ili kolizios post uno horo. Se la abelo flugis je 150 km/h, ĝi flugus 150 km antaŭ ol ĝi dispremiĝis.

– Bone, mia amikino, diras la instruisto, eble vi fariĝos inĝeniero anstataŭ matematikisto!


Sed nun vi devas almenaŭ priskribi tian algebran serion, por ke malprofunda observanto konsiderus, ke la trajnoj kaj la abelo koliziis!

Ŝi faris ĝin en malpli ol kvin minutoj, do la instruisto ne havis tempon fari alian laboron.



## Studanta kato

Katoj puŝas aĵojn for de tabloj, ĉar ili studas gravitecon. Ili estas ne stultuloj. Ili estas sciencistoj.



Facebook: Linda T. KraftMaths and Science Humour


# OMNI raportas pri mistikaj flugantaj objektoj

**Usono ne povas klarigi la mistikajn flugantajn objektojn.**

**Nova raporto: Mistikaj flugantaj objektoj povus esti eksterteranoj.**

**USA kan inte förklara de mystiska flygande objekten.**

**Ny rapport: Mystiska flygande objekt kan vara utomjordingar.**



© Tillhandahålls av Omni / Estas provizita de OMNI.

La usona registaro ne trovis pruvojn ke la UFOj, kiuj estis observataj de pilotoj, estus eksterteraj kosmoŝipoj, sed ili ne povas klarigi, kio estas la movanta fenomeno.

Tio klariĝas en la inform-raporto pri la afero, kiu estos prezentita al la usona kongreso la 25an de junio, laŭ fontoj de New York Times.

La fontoj, kiuj estis informitaj pri la enhavo de la raporto, diras ke ĝi konstatas ke la pli ol 120 okazoj, kiuj estis observataj dum la du jardekoj, ne povas esti konektitaj al la usonaj militistoj aŭ al usona tekniko, kio ŝajne ekskludas la eblecon ke la pilotoj ekvidis ion de sekreta registara projekto.

Oficisto diras al la gazeto, ke troviĝas timo ke povus esti Ĉinio aŭ Rusio, kiuj faras eksperimentojn pri hipersona tekniko. Se estus tiel, povus signifi ke la respondeca milita tekniko de la lando nun altgrade preterpasis tiun de Usono, skribas New York Times.

Relatigitaj informoj:

Den amerikanska regeringen har inte hittat några bevis på att de oidentifierade flygande objekt som observerats av piloter är utomjordiska rymdskepp, men de kan inte förklara vad det rörliga fenomenet är för något.

Det framgår i den underrättelse-rapport om frågan som ska lämnas över till den amerikanska kongressen den 25 juni, enligt källor till New York Times. Källorna, som har blivit informerade om rapportens innehåll, säger att den slår fast att de över 120 fall som observerats de senaste två årtiondena inte kan kopplas till den amerikanska militären eller till amerikansk teknik, vilket verkar utesluta möjligheten att piloterna fått syn på något från ett hemligt regeringsprojekt.

En tjänsteman säger till tidningen att det finns farhågor om att det kan vara Kina eller Ryssland som experimenterar med hypersonisk teknik (överljuds-teknik). Om det skulle vara fallet kan det betyda att det ansvariga landets militära teknik nu har

La pilotoj diris, ke la objektoj ne havis videblan motoron sed kapablis atingi pli ol 9000 metrojn.

Pentagon montris dum la lasta jaro filmojn, faritaj de usonaj pilotoj, kiuj montris iliajn renkontojn kun la nekutimaj veturiloj. (AFP)

Barack Obama pli frue diris en intervjuo, ke troviĝas kelkaj aferoj pri eksterteranoj, pri kiuj li ne povas paroli (thehill.com) /Siv

sprungit om USA rejält, skriver New York Times.

Relaterat:

Piloterna har sagt att objekten inte hade någon synlig motor men kunde nå över 9 000 meter.

Pentagon släppte förra åren filmer tagna av amerikanska piloter som visade deras möten med de ovanliga farkosterna. (AFP)

Barack Obama har tidigare sagt i en intervju att det finns en del saker om utomjordingar som han inte kan prata om (thehill.com) /Siv



*Ovåder – Perturba vetero*

## Kontribuo de Harold Brown al Esperanto-teatro

Eseo de Zofia Banet-Fornalowa

Harold Brown apartenas al intelekta kaj kultura elito de la Esperanto-komunumo. Li distingiĝas per vasta kono de eŭropa kulturo, sed ne nur eŭropa: literaturo, plastikaj artoj, estante mem elstara pentristo, kaj muziko; li pianoludis – ŝatis improvizi. En ĉiuj branĉoj li ion valoran verkis.

Diversloke en E-revuaro oni povas trovi liajn pensigajn artikolojn, foje recenzon. Parto da ili estis kolektitaj en volumo "Leteroj el Svedio". Ĝi enhavas aron da interesaj raportaĵoj senditaj de li al Londono inter 1985–2002. Ili estis publikigitaj en "La Bulteno" de Londona Klubo. En 2003 ĝi festis sian centjariĝon. Ĉi okaze oni decidis i.a. eldoni la artikolaron de sia iam aktiva membro, kiu post emeritiĝo translokiĝis al

Svedio, sed daŭre restis fidela al la klubo, kie li kiel esperantisto evoluis.

Harold rapide lernis la svedan, kio ebligis al li enprofundiĝi en svedan gazetaron, ja informoj de ĝi fariĝis bazo por liaj Leteroj. Li ekkonis la svedan tiomgrade, ke li kune kun sia amikino Kerstin Rohdin, tradukis al Esperanto: "Emilo de Smolando" kaj "Fratoj Leonkoro" de Astrid Lindgren, kiun oni konsideras perloj de sveda literaturo.

Kune kun Kerstin, li faris plurajn vojaĝojn al diversaj eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. Ili vizitis ankaŭ plurajn lokojn en de li tre ŝatata Svedio. Kvarope, kune kun amikoj; geedza paro el Japanio ili denove vizitis plurajn vidindaĵojn vaste tra Svedio. De ĝi ekestis raportaĵo de Kerstin kaj Harold: "Svedio du



bildoj". Harold planis verki aliajn librojn. Unu antaŭanoncitan li titolis "Barelo malplena".

Li verkis ankaŭ anglalingve; poemojn, foje tradukante ion interesan al la sveda. Tamen, aparte grava por li; verkita en la angla estas libro aŭtobiografia, kiun li titolis: "Five selfportraits" (Kvin aŭtoportretoj). Li ne planis ĉi-verkon vaste distribui. Ĝi estis verkita por amikoj, kaj aparte dediĉita al sia filo Mark. Unu el ĉefaj kaŭzoj, kiun li mencias en komenca parto de tiu libro kaj direktita al Mark, estas fakto, ke li neniam havis eblecon aperte paroli kun sia patro kiel persono plenaĝa. Harold rimarkigas, ke li ne pretendas, ke ĉio kion li skribas estas vero. Li celas transdoni al sia filo sian vivon tian kian li mem ĝin vidas. Ŝajnas, ke konatiĝo kun spertoj, pripensoj de Harold ĉi-rilate havas multe pli ol personan karakteron kaj oni esperu, ke liaj proksimuloj decidus pozitive pri traduko de ĉi-verko al Esperanto. Mi estas privilegita, ĉar mi ne nur ricevis anglan version, sed ankaŭ po du ĉapitrojn tradukitajn al la sveda kaj Esperanto. La verko ne nur min pensigis, sed ankaŭ profunde kortuŝis. Dua lia libro: "Always summer" (Ĉiam somero) ampleksas ĉ. 100 p. Kerstin intencas ilin eldoni. Ambaŭ rilatas... arton vivi. Estas verkitaj en flua, facila angla lingvo. El ili emanis varmkoreco kaj subtileco karakteriza por Harold. Per ĝi la legantoj proksimiĝos, intimiĝos al li.

Tamen, plej signife Harold Brown enskribiĝis en Esperanto-kulturon pere de sia dramverkaro.

La teatraĵojn estas malfacile sintezi, priskribi, strukturi kelkfrazo, ĉar teatro havas sian specifan lingvaĵon. Scenejon regas apartaj leĝoj. Tiukaŭze nur malmultaj entute, en Esperantio, kapablas en tiu arta branĉo verki ion valoran, elstari. Harold tion kapablas, kaj krome disponante, per sceneja sento-arto li kelkfoje mem prezentis iun el siaj monologoj. Tamen, tio kio tutcerte estas por li plej grava;

estas la fakto ke li havis ŝancon vidi kelkajn siajn teatraĵojn sursceneje.

Kiel feliĉon oni devas konsideri koincidan renkontiĝon kun Jerzy Fornal, profesia dram-aktoro, disponanta krome pri pantomima, altnivela art-metio. Ĝi fruktis unue en du teatraĵoj prezentitaj kadre de ties Unupersona – E-teatro "Espero". Ili estis speciale de Harold por Jerzy verkitaj. Ambaŭ havis siajn premierojn en Svedio, kaj poste estis spektataj de centoj da esperantistoj en pluraj aliaj landoj. Ankaŭ por Jerzy Harold kunverkis kun la aŭtorino de ĉi-eseo, okaze de Centjariĝo de E-teatro, teatraĵon – "La Jubileo". Ĝia premiero okazis la 26an de junio 1996, en la Varsovia Klubo de Pola Esperanto-Asocio, kaj poste kelkfoje en sidejo de E-teatro "Espero" en Muzeo de Azio kaj Pacifiko – Art Galerio "Nusantara" en Varsovio, ce str. Nowogrodzka 18a.

Samjare, per ĝi oni omaĝis al dramverkistoj, aktoroj, reĝisoroj kaj aliaj artistoj, ankaŭ al kulturagantoj dediĉantaj siajn talentojn kaj organizajn kapablojn dum kelkaj pollandaj E-aranĝoj en: Gliwice, Lodzo, Poznano; entute okfoje en Pollando. Same eksterlande dum gravaj internaciaj E-aranĝoj inter alie; en Eger, Hungario dum la 15a Internacia Konferenco de Literatura Forumo, kaj dufoje prezentita en Kopenhago dum la 5a Kultura Esperanto Festivalo. Tie, ambaŭ ĉeestintaj aŭtoroj de la teatraĵo havis eblecon aŭdigi enkondukon al la spektaklo kaj ĝui bonan akcepton fare de la spektantaro. Kaj poste ankaŭ legi pri ĝi tre favoran recenzon verkitan de vaste konata kultur-konanto, iama kunredaktoro de "Norda Prismo", Mogens Groth. La teatraĵo montris dignan omaĝon al la artistoj, kiuj per sia arto dum pli ol 100 jaroj signife riĉigis kaj daŭre riĉigas Esperanto-kulturon.

Harold kune kun sia amikino Kerstin Rohdin; arda apogantino de lia verkado, havis ankaŭ eblecon kontenti pri sia arto dum turneo tra

Svedio dum kiu estis prezentita "Eduko danĝera", ĝuante bonajn rezultojn de kunlaboro kun la aktoro.

Kiel dirite priskribo de teatraĵo ne spegulas ĝian spiriton nek transdonas emocion kiun ĝi enhavas. La teatraĵoj estas verkitaj por ke oni ilin spektu, minimume atente, en intima etoso donanta eblecon enprofundiĝi en kernon de intrigo, empatie (ts. ensentiĝi) rilati al la heroo; nome identiĝi kun ties situacioj, legi. Harold havis feliĉon konstati, konvinkigi pri valoro sceneja de siaj dramoj, ĝui akcepton flanke de la publiko.

Valoras provi respondi je demando kiaj trajtoj de lia dramarto kaŭzas enpensigon; elvokas profundan impreson, foje ankaŭ fajnan amuzon kvankam ofte tielnomatan... ridon per larmoj. Ŝajnas, ke la kaŭzo fontas de la fakto, ke la aŭtoro prezentas surfone de realaj situacioj personojn iel ne povantaj sin troviĝi en reganta realeco. Tia ekz. estas la vagabondo (el samtitola monodramo). Harold dotas ilin per tia varmeco kaj simpatio, ke spektante la prezentadon oni ĉiam pli proksimiĝas al la heroo, eĉ se ŝi/li ne samopinias kaj vivas laŭ tute kontraŭa mondkoncepto oni kun ties strangaj ideoj simpatias.

Dua grupo de liaj herooj konsistas de homoj, kies tragikan aŭ nur malkomfortan sorton, situacion determinis cirkonstancoj, historio je kiu ili nenian influon havis, kiel ekz. "Edipo", aŭ heroo el "Eduko danĝera".

Harold startis verki teatraĵojn en sufiĉe malfrua aĝo, jam post sia viv-kariero. Lin mem signife la vivo spertigis. Junaĝe li servis en brita armeo dum la Dua Mondmilito, ie en foraj dezertoj de Afriko. Postmilito li studis en London School of Economics. Sekve poste plenumis laŭvice diversajn taskojn en Ŝtataj Departamento; unue pri imposto poste informado.

Lia observemo kaj preteco kompreni komplikecon de l' vivo kaŭzis, ke li pretis kaj kapablis empatii, tio, kiel dirite, ensentiĝi en diversajn malkonformajn situaciojn. Interesis lin viv-konceptoj de tiuj, kiuj ne pretis akcepti ĉiutagaĵojn. Tiuj alternativuloj saĝe aŭ malsaĝe, sed preskaŭ ĉiam neprudente kontestas, havas proprajn ideojn; ofte tute nerealigeblajn fontanojn de revoj ion ŝanĝi en la socio. Ili ĝuste allogas la aŭtoron, kiu celas la spektantaron al ili favoriĝi.

Tamen, ne nur filozofia kaj psikologia flanko de situacioj allogas la aŭtoron al la temo. La herooj de liaj teatraĵoj estas de diversaj vidpunktoj interesaj. Tamen ne nur spirita bazo sukcesigas la teatraĵojn de Harold. Gravan influon je tio, havas ankaŭ aparta metio per kiu li disponas. La aŭtoro estas talenta pentristo, li studis en Chelsea School of Art en Londono. Aparte liaj grafikaj prezentoj de homoj; ĉiam iel nedefinitaj laŭ aspektoesprimo, ankaŭ laŭ vestaĵo – vekas interesiĝon, enpensigon.

Distingiĝas liaj grafikaj portretoj de tre subtile bildigitaj virinoj. Ilin vidante oni provas diveni, kiun personecon la artisto volis prezenti. Bone okazis, ke en la 90-aj jaroj lia arto estis ekspoziciita en kelkaj lokoj de Svedio.

La kapablo pentri influas tutcerte ankaŭ indikojn pri lumaranĝo kio grave influas bonan prilumigon de scenejo kaj rezulte la prezentitajn teatraĵojn.

Samo rilatas scenografion. Ĉio-ĉi liveras al la plenumanto de liaj teatraĵoj multajn interesajn motivigajn premisojn ne nur por la situacioj kaj personoj prezentitaj, sed elvokantaj apartan impreson.

Samo rilatas muzikon, kiu estas akorda al la teksto. Ĝi ankaŭ per sia elvokemo kaŭzas kromajn asociojn.

Oni ofte diras, ke arto de apartaj artistoj ne nepre devas esti akorda al la personeco de

artisto mem. Nome bona, bela laŭ animo artisto, ne nepre kapablas evidentigi sian spiritecon en sia arto. Ĉi-loke trudigas koncepto de Sokrato, kiu identigis bonon kun belo, noblecon kun vero. Tiel, kiel supre dirite, ne nepre okazas en realo.

Se temas pri Harold la Sokrata doktrino, kiun oni nomas etika intelekto plene konfirmiĝas. Harold karakteriziĝas per aparta bonvolemo kompreni kaj helpi al ĉiu laŭeble. Tio signifas ne nur toleri, sed kun komprenemo kaj simpatio akcepti aliecon. Ensentigi en situaciojn de homoj malbonŝancaj kaj tio respeguliĝas en lia arto. Cetere ne nur dramarto, sed ankaŭ en pentroarto, poezio, publicistiko en kiu li ankaŭ distingiĝis.

Harold, ekde komenco de sia dramverkado estis rimarkita, kiel aparte interesa verkisto en ĉi-genro. Lia dramo "La fino de l'ferio" ricevis: Laŭdan Elstarigon de la Esperantista Verkista Asocio (EVA), en la teatraĵa konkurso okazinta lige kun Jubileo de Centjariĝo de E-teatro.

Alia lia teatraĵo "Rigardu antaŭ ol salti" estis akceptita por prezentiĝi en Londona Klubo, kiel kontribuo okaze de la sama Jubileo. Kiel menciite li mem prezentis plurfoje en Anglio kaj Svedio monologon "La prelego". La teatraĵo "Edipo" estis prezentita en radio en kelkaj landoj.

Harold ofte, dum siaj vojaĝoj, aŭ surloke aŭdigis prelegojn; ĉiam enpensigantajn.

Bone okazis, ke Eldonejo "Ulekso" kiun li kun Kerstin Rohdin fondis por eldoni sian verkaron, publikigis tie en 1995, libron titolitan "Eduko danĝera" enhavanta 10 liajn teatraĵojn.

Ne eblas karakterizi apartajn teatraĵojn unufraze. Mi do nur citos titolojn aldonante po kelkaj frazoj indikantaj, kion ĉefe la teatraĵo rilatas. Memkompreneble, ke la indikoj ne estas plene adekvataj, ĉar ĉiu

teatraĵo estas plurenhava ne nur laŭ intrigo, sed ankaŭ laŭ soci-psikologia fono.

Imagon kaj impreson pri ĉiu teatraĵo donas nur ekzakte arta prezento; nome teatra spektaklo. Minimume kiel menciite persona, intima enprofundigo dum legado. Tia ebleco feliĉe ekzistas danke al la kolekto.

Antaŭ listigo de teatraĵoj el la kolekto "Eduko danĝera", pri titolo de unu tie troviĝanta teatraĵo valoras atentigi, ke ĝuste la titolo esence spegulas, motivigas tion, kion la aŭtoro volas transdoni pere de siaj teatraĵoj. Li de arta vidpunkto analizas situaciojn de individuoj en socio, grandparte inter 50–55 jaraĝaj kiuj ricevis "edukon", viv-spertojn plejofte tre amarajn. El ili fontas reprenitaj decidoj pri... daŭra vivo aŭ... morto.

Ĝenerale dirite, la grandparto el la teatraĵoj troviĝantaj en kolekto "Eduko danĝera", temas pri homoj kiuj pro diversaj tute malsamaj kaŭzoj sentas sin solecaj iel apartigitaj en siaj medioj.

"La maristo" – prezentas tipan eksterulon nemaloftan en tiu medio pro specifeco de pasigo de vivo, sed ja ne nur karakteriza por ĉi-medio. Ĝi estas dramigo de la angla fama romantika verko "The ancient mariner" (La maljuna maristo) de S.T. Coleridge. Rememoro pri droninta ŝipo "Katrin"; vera okazintaĵo el la jaro 1869, obsedas la ununuran mariston de la skipo, kiu saviĝis. La rakonto estas impresiga; spektakle spegulas batalon inter marondoj kaj la maristaro. Soleco de la savito kaj turmento pro imago, ke mortigo de akompananta ŝipon birdo – Albatroso, iel influis la katastrofon, profundigas lian malfeliĉon.

Harold, tipa insulano estis tre ligita kun la maro; ĝia forto, fonto de pluraj dramoj, estas ofte spegulita en lia verkaro. Ankaŭ en la fino de "Vagabondo" la marista kanto esprimas iasence homan viv-vojon.

Imago de mara lanterno kaŭzas spinadon de rememoroj pri la infaneco. "La maristo" donas al la aktoro eblecojn kortuŝi kaj impresi profunde la publikon.

La samo rilatas monodramon "Vagabondo", ĝi spegulas nepron de libereco al kiu la heroo sopiras. Por li ĝi havas apartan valoron por ne esti ereto en disciplinita, ofte absolute forigita de humanismo socia ordo. En ĝi la aŭtoro enmetis plurajn siajn proprajn spertojn.

Evidentiĝas ankaŭ karakteriza por li lirismo. Jerzy prezentas ĝin de pluraj jaroj; kortuŝante kaj pensigante la spektantaron. La "Vagabondo" estis prezentita por la unua fojo en 1992 dum la Kongreso de Sveda Esperanto Federacio en Oskarshamn, la 23an de majo.

Nun post pli ol 12 jaroj Jerzy prezentos ĝin en Högsby – urbo, kie de pluraj jaroj Harold vivas en la "Flava Domo" kun sia viv-kunulino Kerstin, aparte tiom varme spegulita en ĉi-teatraĵo. Li prezentos ĝin en aliaj kondiĉoj al la amiko, kiu devas fronti neatenditaĵon; teruran malsanon, situacion, kiun li akceptas kun digno ĉiam lin karakterizanta. Al ĉi-prezento Harold pretigis belan kajeron-scenaron kun indikoj por la spektaklo. Desegnita kaj kompostis ĝin Peter Oliver.

"Eduko danĝera" – kies premiero okazis en Högsby en marto 1990 kaj kiel dirite, dum turneo tra Svedio, plurfoje en Pollando kaj aliaj landoj. Ĝi prezentas homon kaptitan de homamaso dum kaoso kaŭzita de Franca Revolucio. Surbaze de sociaj procezoj li fariĝas tute senkulpe ĝia viktimo pro instruiteco kaj eduko, kiun li devenanta de la sama homamaso, atingis. En ĝi la aŭtoro evidencigas fojfoje tipan anglan humuron rilate al la najbaraj francoj.

"Rigardu antaŭ ol salti" – plurpersona komedio en ĝenro de purenonsense (sensensaĵo): – en ĝi temas pri homo kiu konsideras sian vivon sensukcesa kaj sin

entute sentaŭgulon. Ĉi-kaŭze, decidus sinmortigi. Tamen, en tio li ankaŭ ne sukcesas. Dum disvolviĝanta intrigo okazas diversaj intervenoj, sufiĉe komikaj kaj absurdaj. Fine montriĝas, ke eĉ en plenumo de sia determine ekstrema decido, la homo dependas de aliaj, kaj la heroo devas sin konsideri denove sentaŭga, nesukcesa.

"La prelego" – monologo pri botaniko: temo elektita de preleganto mem rilatas homon plenan da kompleksoj, verŝajne devenantaj de severa junaĝo. Kaŭzis ĉi staton lia patrino al kiu Ordo estis idolo.

Havante antaŭ si la publikon, li anstataŭ rilati al la temo malkovras tion kio troviĝas en profundeco de lia subkonscio kaj pro Ordo li rakontas pri murdo kiun li kaŭzis nesciante kial.

Li volas kompreni kial tio okazis por entute kompreni mondo-ordon kaj tion kio okazas en universo, pro kio la homo estas foje sence de sia volo forigita.

La prelego pri botaniko fakte ne okazis. La preleganto ne kapablis ĝin aŭdigi, ĉar li estis obsedita pri sia situacio. La monologo estas tre interesa de psikologia vidpunkto. Taŭgas pli por radia elsendo ol sceneja, ĉar mankas al ĝi movo, ŝanĝo de situacioj.

"La Pesto" – teatraĵo por duopo (li, ŝi) kiel ĉiam, temas pri mezaĝuloj.

Temas pri renkontiĝo de du geamikoj: viro kaj virino. Diskuto pri esencaj aferoj, malvirtoj de homoj en krizaj situacioj. Malklereco kaj superstiĉoj elvokitaj de situacio; signo de obskurantismo. Temas pri estetika stilo, kiu gravas en homa vivo; kiel ekz. morti.

"Fina Juĝo" – kiel devas rilati al la neevitebla morto. Homo endanĝerigita kia li estas; devas esti rilato inter la foririnto kaj tiu, kiu restis!

"La vera pesto estas io en ni mem". Ĝi de ekstere estas nur fajro kiu evidentiĝas! Bruligas la sekajn branĉojn. Atendanto de la

morto do havas ŝancon ion serĉi, trovi. Li akiris certecon pri unikeco de okazintaĵoj.

Tion donis al li konvinkon pri ununureco de lia vivo, ĝi estis mirinda sukceso. Ĉe fino evidentiĝas digno kun kiu ili frontas neeviteblan morton kaj kapablas ĝui la lastajn momentojn. La teatraĵo estas filozofia kaj malgraŭ la pesimisma fono, ne tute pesimisma.

“Edipo” – tragedio de tiu mita heroo kaj de lia tuta familio. En ĉi monologo (rakonto, nedramigita) evidentiĝas la nekonscio pri la fato. Tamen okazinta atendo maltrankviligas. Edipo atendas novaĵojn, kiu helpas pozitive solvi krizan problemon de lia regado. Baldaŭ venos teruraj novaĵoj, kiuj fariĝos tragedio por li kaj lia tuta familio. Por ili la tuta mondo falis.

“Li enlitiĝas, li leviĝas” – ĝi ŝajnas esti tre grava; verdire temas pri senco de la vivo. Ĝia celo, eblecoj. La pensoj obsedas. Oni troviĝas en iu vivo-cirklo. En ĝi la aŭtoro ŝajne spegulas sian ĉiutagaĵon, same pensojn pri limoj de homa ekzisto. Ĉu ĝi estas pesimisma. La aŭtoro ne donas striktan respondon. Li pensigas... Aperas eta espero... Ĉu?... Kio ajn impresas.

“La fluto” – plurpersona teatraĵo. Temas pri bedaŭro pro maltrafita ŝanco, perdo de personeco, de amo, ŝato ludi, pro troa dependeco de patrino kaj onklino. Ankaŭ pri malrespekto de emo, volo, kiu kaŭzas pardon de ŝanco.

“Hamleto” – radio-monologo. Scenaro povanta fariĝi bazo por filmo, ankaŭ baletto, pantomime. Temas pri nuntempa koincido de scenaro kun historia Hamleto. Superas la dramecon pentroimpresoj; ege impresigaj – oni povas ĝin nomi prezento modernisma. Ŝajnas, ke tio kio vekas asociojn kun la Ŝekspira Hamleto, estas reganta en ĉiuj sep scenoj, interna maltrankvilo de heroo, same malekvilibro de ĉio, kio lin ĉirkaŭas.

Neimagebla inventemo de artisto-pentristo superas – regas la tuton. Ŝajnas, ke ĝuste ĉi lasta en la priparolita kolekto pleje evidentiĝas maltrankvilon pri kaoso de la mondo kaj la sopiron al harmonio de la verkisto mem.

Oni esperu, ke ĉiuj teatraĵoj de Harold trovos favoron de iuj amatoraj kaj profesiaj plenumantoj. Ili plene tion meritas. Same pro la enhavo, kiujn ili heroldas, interesa dramigo, idea valoro – profunde humanisma. Do, resume ilia arta valoro.

### **Noto aldona**

Mi estis finanta ĉi-eseon, enhavantan impresojn pri dramarto de Harold Brown. Laŭ ideo de Kerstin Rohdin, mia kaj de Jerzy elkora amikino, estis interkonsentite, ke mi prezentos ĝin, kaj Jerzy la “Vagabondo”-n de Harold dufoje, maje ĉi-jare en Högsby. Unue en “Flava Domo”, kie li kun Kerstin plurajn jarojn pasigis kaj kiun li tiel varme priskribis en “Vagabondo” en ĉi domo verkita.

En ĉi-prezento partoprenus nur nia kvaropo, sed ĝi aparte devis esti dediĉita al tre malsana Harold. La dua devis laŭplane okazi en Mogården (Hejmo de Prizorgo), kie dum la lastaj du jaroj loĝis Harold. Ĝi estus dediĉita al ties personaro kaj kelkaj invititaj esperantistoj. Harold tion deziris kaj ĉu Kerstin subkonscie kredis pri iu... miraklo... Ni tre ĝojis pri ebleco denove ekvidi Kerstin kaj Harold. De pluraj jaroj ni estis proksimaj amikoj, kunestadis en niaj hejmoj, efike kunlaboris.

Kaj... la 10-an de marto posttagmeze en telefono aŭdiĝis voĉo de Kerstin. Aŭdinte ŝin mi kun kontento informis, ke ni kapablis tiel aranĝi niajn planojn, ke ni venos laŭ de ŝi proponita dato la 10-an de majo al Högsby. Ĉi-momente, de fore aŭdiĝis ĉagreniga informo: io ŝanĝiĝis, Harold ĉi-nokte mortis...

La impreson ne eblas esprimi. Mi ne ŝanĝis la tekston; mi skribis por la vivanta kaj

karmemora Amiko, li ja daŭre vivas en mia koro kaj memoro. Pere de sia boneco, subtileco, altnivela profunde humanisma arto.

Kara Harold – in Memoriam. Vin neniam kovros vualo de forgeso...

Kerstin decidis ke tamen ni venu kaj tio kion ni planis prezenti antaŭ Harold estu prezenata en Memor-renkontiĝo. Ne eblas tion malkonsenti, kvankam estas tre malfacile akcepti, ke kara Harold ne plu viva estos inter ni.

**Majo 2004 Zofia Banet-Fornalowa**



En mia bretaro troviĝas


*Svedio, du bildoj*  
*Eduka danĝera*  
*Emilo en Smolando*

Eble troviĝas pliaj en la Stannum-biblioteko.

Se vi volas kontakton kun Kerstin Rohdin ekz. se interesas al vi bildon farita de Harold Brown (sur la sekvaj paĝoj) – jen ŝia adreso: k.rohdin12@gmail.com aŭ tel.numero: 08-777 08 61 (la landa numero de Svedio estas +46). /Siv

## Bildoj, faritaj de Harold Brown

### 1. Memportreto



### 2. Ilustraĵo por libro



3. Litografoj



4. Ilustraĵo por libro



5. Libroilustraĵo



6. Muzikvespero




7. Infaneco



8. Kiel oni uzas la vivon




9. Kaj tiam ekis.....



10. Naskiĝtaga donaco



11. Diamanto



12. Ermitejo



## UK en Belfasto nuligita: anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso

Aliĝilo de la 2:a Virtuala Kongreso de Esperanto:

<https://vk.esperanto.net>

Senpage por individuaj membroj de UEA aliĝintaj ĝis la 4.a de julio.



**2<sup>a</sup> VIRTUALA KONGRESO  
DE ESPERANTO**  
**17-24 de JULIO 2021**

**"Paco kaj konfido: universalaj valoroj."**





# Frusomera promeno en Gotenburgo

## En försommarpromenad i Göteborg



Mi venas per trajno de Alingsås kaj eliras je la stacidomo en Gotenburgo. Granda amaso da vojaĝantoj trabatas sur la kajoj, do mi sentas min kontenta kiam mi staras meze de "Drottningtorget".

Maldekstre situas la impona kaj olda poŝtdomo, kiu estis preta en majo 1925. Hodiaŭ ĝi funkcias kiel hotelo kaj estas alkonstruita per nuntempa griza kvarangulo. Antaŭe estis grave por la stata poŝtadministracio ke la konstruaĵo estis centra por faciligi al la korespondantoj, "Letero estas grava afero", almenaŭ tiam.

Dekstre mi vidas "Hotelo Eggers" meze de ĉiuj krucantaj tramaj trakoj. Krome la hotelo estas konstruita sur la restaĵoj de iuj ruinigitaj fortikaĵoj en Gotenburgo.

Kiam mi rigardas rekte al "Trädgårdsföreningen", mi vidas la komencon de "Stora Nygatan", kiu iras paralele al la

Jag kommer med ett tåg från Alingsås och stiger av vid Göteborgs Central. En stor hop av resenärer trängs på perrongerna så jag känner mig nöjd när jag står mitt på Drottningtorget.



Till vänster har jag det pampiga gamla posthuset som stod klart i maj 1925. Idag fungerar det som hotell och har byggts på med en nutida fyrkant i grått. På den gamla tiden var det viktigt för postverket att bygget blev centralt beläget för att underlätta för korrespondenterna, ett brev betyder ju så mycket, i alla fall då.



Till höger ser jag Hotell Eggers mitt bland alla korsande spårvägsspår. Dessutom är hotellet uppbyggt på resterna av några av de raserade befästningarna i Göteborg.

När jag tittar rakt fram mot Trädgårdsföreningen ser jag början på Stora

kanalo, kiu disigas la straton kaj la ĝardenon.

Se mi aŭskultas vere atente, mi povas aŭdi tonojn de "Moldau" de Bedrich Smetana flosante kiel mildaj memorigoj ke Smetana laboris kaj loĝis ĉi tie sur "Stora Nygatan" dum la jaroj 1856–1861.

Iam en la ĝardeno, mi marŝas sur la pado, kiu etendiĝas laŭ la kanalo. Mi vidas iujn platbekajn anasojn kiuj saltetas en la akvosurfaco. La domoj aliflanke speguliĝas en la akvo.

Oni povas preskaŭ vidi "17 ½", la sinagogon kaj aliajn domojn. La vegetaĵaro estas rimarkinde bela kaj ĉioj ekkreskas kaj komencas flori kaj vivi. Padusoj, siringoj kaj kaŝtana arboj. Por tiuj, kiuj volas, estas multe pli por malkovri ĉi tie.

Aparte en la tropika "Palmhuset" kaj la rozĝardeno, kiujn ni ankaŭ ne forgesu. Lunĉliberaj homoj sidas kaj ĉerpas fortojn sub la suno. Infanoj ludas, kelkaj lernejoj klasoj ekskursas, panjoj kaj paĉjoj tiras bebĉaretojn kaj iu sidas kaj legas sur benko. Kiam mi forlasas la ĝardenon, mi vidas la grandan gotenburĝan donacinton Charles Felix Lindberg, promenanta ŝtonigatan. Eble li volas memorigi nin, ke li donacis sian heredaĵon por



Nygatan, som löper jämsides med kanalen som skiljer gatan och trädgården. Om jag lyssnar riktigt noga, kan jag höra toner ur Bedrich Smetanas "Moldau" flyta omkring som mjuka påminnelser om att Smetana verkade och bodde just här på Stora Nygatan under åren 1856–1861.

Väl inne i trädgården går jag på stigen som går utmed kanalen. Jag ser några gräsänder som ligger och guppar i vattenbrynet. Byggnaderna på andra sidan speglar sig i vattnet. Man kan ana 17 ½, synagogan och andra hus.

Växtligheten är påtagligt vacker och allt tar fart och börjar blomma och leva. Hägg, syren och kastanjetråd. För den som vill, finns så mycket mer att upptäcka här. Inte minst i det tropiska Palmhuset och Rosengården som vi inte heller får glömma.

Lunchlediga sitter och hämtar kraft under solen. Barn leker, en och annan skolklass har utflykt, mammor och pappor drar barnvagnar och någon sitter och läser på en bänk.

När jag lämnar Trädgården ser jag den store göteborgske donatorn Charles Felix Lindberg, gå en förstenad promenad. Kanske vill han påminna oss om att

plibeligi kaj doni al la urbo la eblon ornami. Gotenburgo estu belega urbo. Charles Felix Lindberg mortis pro nekklaraj cirkonstancoj la 5-an de aŭgusto 1909. Tamen estis medicina diagnozo.

Mi sekvas la kanalon al "Grönsaktorget", kie la ĉina flago flirtas en la vento ĉe la blanka, turigita konstruaĵo, kiu estas la "Ĉina ĉefkonsulejo" en Gotenburgo.

Elirinte sur "Västa Hamngatan" mi preterpasas la Gotenburgan katedralon, kiu situas malantaŭ altaj imponaj arboj.

La antaŭa placo estas vasta kaj eĉ ĉi tie homoj sidas kaj ĝuas la frusomeran sunon. Sur soklo sur la placo sidas la granda kaj postulema sobrecoprobatalanto Peter Wieselgren. Li batalis kontraŭ drinkado sed ŝatis trinki kaj vinon kaj bieron, laŭdire.

Mi daŭrigas malsupren al "Skeppsholmen" kaj ekhaltas ĉe "Lilla Torget", kie staras la palaco de la familio Wijk. "La familio Wijk riĉiĝis per najloj", ŝercis gotenburgoj. (Pli amuze en la sveda lingvo).

Ĝuste nun, la bufa boato "Paddan", plena kun espero pri la estonteco kaj bruantantaj studentoj, fluanta en la kanalo kontraŭ "Stenpiren". "Ĉar ni ekestis studentoj ..." kaj certe ili estas bonaj ĉiuj laŭ siaj manieroj.



han donerat sitt arv för att försköna och ge staden möjlighet till utsmyckning. Göteborg skulle bli en vacker stad. Charles Felix Lindberg dog under oklara omständigheter den 5:e augusti 1909. Det fanns dock en medicinsk diagnos.

Jag följer kanalen fram till Grönsaktorget där den kinesiska flaggan vajar i vinden på den vita, tornförsedda byggnaden som är "kinesiska generalkonsulatet" i Göteborg.

Väl ute på Västa Hamngatan passerar jag Domkyrkan som ligger bakom höga mäktiga träd. Planen framför är stor och även här sitter folk och njuter av försommarens sol. Högt uppe på ett fundament på planen sitter den store och stränge nykterhetsförkämpen Peter Wieselgren. Han var emot superiet men drack själv gärna både vin och öl har det sagts.

Jag fortsätter ner mot Skeppsholmen och stannar till vid Lilla Torget där familjen Wijks palats står. "Familjen Wijk blev rik på spik" har Göteborgarna skämtat.

Just nu kommer en Paddanbåt fylld med framtidshopp och skrålande studenter flytande i kanalen mot Stenpiren. "För vi har tagit studenten..." och visst är dom bra var och en på sitt vis.

Poste ni revenas al la komenco! Sur la ĉefpaĝo de Ora Ĵurnalo estas Jonas Alströmer, kiu estos ordema briliĝanta antaŭ ĉi-aŭtune, eble antaŭ la granda terpoma festivalo en Alingsås, ĉar la lasta terpomo ankoraŭ ne estas plantita! Nek por Gotenburgo nek por la lingvo Esperanto!

Nun ni iras al "Esperantoplatsen", estas fortoj en la esperanta klubo en Gotenburgo! Kunvenu! /Ingegerd

Sedan är vi framme där vi började! På Ora Ĵurnalos förstasida står Jonas Alströmer som nu skall bli ordentligt uppputsad till hösten, kanske inför den stora potatisfestivalen i Alingsås, för än är inte sista potatisen satt! Varken för Göteborg eller för språket Esperanto.

Nu beger vi oss till Esperantoplatsen, det är full fart på Esperantisterna i Göteborg. Häng på! /Ingegerd

## Albumeto de la kvarcentjara naskiĝtago de Gotenburgo

La gotenburga esperanta klubo celebras sian urbon.



Profesiaj dancistinoj dancas. Spektu ilin en [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org) !



Salikokoj estas festmanĝo en Gotenburgo.



Je via sano, Gotenburganoj!



Ni renkontos nin en la lingva kafejo "Språkcaféet" sur la Esperantoplaco. Kunvenu!